

revuo

esperanto

julio/aŭgusto 1964

57-a jaro

n-ro 704-5 (7-8)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

NOVA INDUSTRIO:

LINGVO-LABORATORIOJ



P. 122: Pliaj kaŭzoj de nekontentiga progresado

ESPERANTO

revuo internacia

- enhavo**
- 121 Iomete pri nia informado (Ziegler)
 - 122 Pliaj kaŭzoj de nekontentiga progresado (Lapenna)
 - 126 Funebra parolado pri Prof. Yagi (Holmes)
Pri la forpaso de Prof. Yagi (Arata)
 - 127 Nova kapitala enspezo por UEA
 - 128 La informa laboro en 1963 (tabelo)
 - 129 Aldone al la informa trarigardo (Ziegler)
 - 130 Lingvo-laboratorioj
 - 132 Novaj libroj
 - 133 Ricevitaj eldonaĵoj
 - 134 Filmo: "Angoroj" (recenzo)
49-a UK Hago: Kien ekskursi?
Eŭropa Esperanto-Konferenco, Vieno, 1965
 - 135 Mallongaj novaĵoj
 - 136 La Juna Vivo
20-a IJK de TEJO, Amsterdam, 1964
 - 137 Elekto de komitatanoj "B"
UEA, proprietulo de la Praktiko
Al Tokio en 1965
 - 138 Esperanto en Radio
Nekrologo: P. Heilker
Citaĵo
 - 139 Oficiala informilo n-ro 370
 - 140 La internaciaj konkursoj 1964
- kovrilo** Instruisto kontrolas la lecionon en "lingvo-laboratorio" (foto I.V.A.C.). Vidu p. 130.
- fotojn** 127 E. Yelland
- liveris** 131 IV.A.C., Bruselo
- 135 Oomoto, eksterlanda fako

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

esperanto
julio-aŭg.
1964

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telefono: (010) 3 27 83. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMADRESO:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Nieuwe Binnenweg 460-462, Rotterdam-6, Tel. (010) 5 66 45.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1964): 15,— gld. (kun membreco kaj jarlibro 20,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj pri korespondado:

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A.:

H. W. Holmes O.B.E., vic-prezidanto, kaj aganta prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri kongresoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odýnca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario kaj estrarano pri informado, Kystvej 10, 2 th., Aabenraa, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

Iomete pri nia informado

S. Ziegler,
estranaro
de UEA pri
informado

Ĉar ekde la fruaj tempoj de la Esperanto-Movado ĝia baza celo estas universaligi la Internacian Lingvon, tute nature la tuta esperantistaro, de la gvidantoj de la organizaĵoj ĝis la plej ordinaraj membroj aŭ izoluloj, plej entuziasme komencadis disvastigi la ĝeneralan scion pri kaj aprezadon de la lingvo kun la celo altiri al la Movado pliajn adeptojn. Ofte tamen montriĝis, ke la laboro okazas tro hazarde, ke ĝi ne estas sufiĉe racie planita kaj utiligata, aŭ ke ĝi suferas pro aliaj kvalitaj eraroj, mallonge ke pro manko de efikeco la rikolto estas absolute tro malriĉa kompare kun la diligenta semado.

Guste por certigi, ke la multaj sindonaj klopodoj estu kiel eble plej racie kaj efike utiligataj en nia informado, por forigi el la Movado ĝis maksimumo la metodajn miskomprenojn, kaj entute por fari sintezon de la amasiĝintaj praktikaj spertoj, en 1956 la tuta problemo estis metita sur la tagordon de kunveno de la informaj fakoj kaj interesitoj dum la SSS en Frostavallen. En 23 koncizaj punktoj la kunveno prezentis la esencajn principojn kaj per tio donis modelan framon de la posta agado. La "Fundamenta Principaro de Informado pri la Internacia Lingvo", kiu post rekonsidero dum la SSS 1959 estis senŝanĝe konfirmita, fine eniris la Duan Bazan Laborplanon de UEA kiel ties konsista parto. La teksto troviĝas en Jarlibro 1959 I, p. 186.

Supozeble la akcepto kaj publikigo de tiuj principoj havis nete pozitivan influon kaj ĝenerale altigis la kvaliton de nia laboro. Tamen, neniel ni povus aserti, ke ĉiuj agantoj absorbis ĉion kaj plene laŭagis tiun koncepton en la propra laboro. Praktike en ĉiuj niveloj de nia informa strukturo — kaj en ĉiuj ties eroj — plibonigoj estas tre dezirindaj.

Sufiĉe bonan scion ni havas pri la laboro, kiun plenumas la unuopaj landaj informaj fakoj kaj kunlaborantoj. Aliloke en tiu ĉi numero vi trovos la kutiman trarigardon pri la informa laboro farita dum la pasinta jaro. La tabelo kaj la aldonitaj sciigoj estas faritaj surbaze de internacia enketo ĉe la koncernuloj. Kvankam ni certe devas preni en konsideron la tradiciajn mankojn de tiaj niaj statistikoj: la *nekompletecon* pro nerespondado malgraŭ memorigoj (mankas ekzemple la gravegaj landoj Italujo, Jugoslavio, Pollando) kaj la *neprecizecon* pro diverskvalitaj respondoj (ĉiuj sumoj estas minimumaj), tamen la enketo ebligas instruan komparon inter la realaĵo de nia laboro kaj la idealoj de la Principaro.

El la 43 landaj asocioj nur 18 veraj informaj fakoj respondis. Se al ili ni aldonas 4 certe ekzistantajn IFojn, ni trovas, ke apenaŭ 50% de niaj asocioj formis tian fakon.

Parte tial la reagoj de la landaj asocioj al la iniciatoj de UEA, inkluzive ĝian informan fakon, ofte estis nekontentigaj, ĉar dum estis atingitaj sukcesoj dise en kelkaj landoj, la celita tutmonda efiko forestis. Ni tion konstatis ĉe kelkaj kampanjoj.

Ĝenerale oni bone komprenas, ke la informado ne nur servu por si mem, sed konkrete ligiĝu al nia kursa aktiveco por altiri pli da gelernantoj. Sajnas tamen, ke tro ofte oni konsideras ĉion ĉirilatan loka afero, ne koncentrigante ankaŭ adekvate la landan aŭ regionan informadon al la antaŭkursa tempo. Plie, ofte oni forgesas daŭre informadi la kursanojn por fine aligi ilin al la Movado.

Same, en la agado ofte tro hazarde oni ligiĝas al unu-du-tri metodoj, forgesante, ke nur la intensa utiligo de ĉiuj eblecoj paralele povas havi pozitivan efikon. Dum la aliloke raportitaj diversaj informaj aktivecoj prezentas *kune* tre belan bildon, diserigante la mozaikon ni trovas, ke la ŝtonoj estas hazarde kolektitaj, kaj ke nur en la plej bonaj landoj oni efike batas per ĉiuj disponeblaj armiloj. Eĉ nur maksimume 15 respondintaj landoj disponas pri regule funkcia gazeta servo, plej baza branĉo.

Pri la agado de la lokaj grupoj kaj de individuaj esperantistoj ni povas, ĝenerale, havi nur sufiĉe nekleran bildon, formitan el multaj personaj kontaktoj kaj surbaze de legado de la esperantista gazetaro. Altrudiĝas ia impresio, ke tiurilate ekzistas grandega grundo kulturenda. Ekzistas, kompreneble, brilaj ekzemploj por montri, kion povas fari nur malmultaj personoj tiurilate. La klubo de Nürnberg — fidela al sia honorinda pasinteco — regule dissendas presitan okpaĝan broŝuron nacilingvan kun bonegaj artikoloj kaj informoj pri lingvo kaj movado kaj per sia partopreno en grava pedagogia ekspozicio per sia zorge selektita esperanta materialo konsiderinde altigis la prestiĝon de Esperanto en tiu medio. Fervoran memstaran agadon faras S-ro Pierre Delaire, kiu en sia propra gazeta servo informis dum 1963 500 francajn gazetojn per 36 — tridek ses! — bultenoj.

La supre faritaj rimarkoj (cetere nur kelkaj eblaj) neniel volas komprenigi, ke nia informa agado estas en kriza stato. Certe nia movado bonsukcese atentigas ĉiujare plurajn milionojn da homoj unu aŭ plurajn fojojn pri la uzateco de la Internacia Lingvo.

Sed restas la pravigita impresio, ke per relative malgrandaj fortostreĉoj ni povos fari tiun nian atentindan batalilon multe pli potenca kaj tiel atingi multe pli gravajn rezultojn. Tio havos esencan signifon dum la venontaj jaroj, kiam tutcerte ĉiam pli serioze prezentigos la Internacia Lingvo kiel la solvo de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj. Elstara okazo por decide komenci tiun konstruon estos la Jaro de Internacia Kunlaboro kun ties taskoj por la Esperanto-Movado, jam aluditaj en la juna numero.

Kontribuon al tiu plenumenda tasko sendube faros la laboro de la 2-a sekcio en Hago pri "Aplikado de Modernaj Metodoj en la Informado pri Esperanto". Al ĝi estas invitetaj ĉiuj interesitoj pri la Esperanto-informado, kio devus signifi: nin ĉiujn.

Pliaj kaŭzoj de nekontentiga progresado

Ivo Lapenna

La artikolo "Kelkaj Kaŭzoj de Nekontentiga Progresado", publikigita en la januara "Esperanto", kaŭzis multajn eĥojn. Granda nombro da korespondaĵoj kun komentoj — senescepte ĉiuj aprobaj — alvenis el diversaj landoj kaj el malsamaj medioj. Tio konfirmis la opinion, ke la analizitaj fenomenoj ne havas nacian karakteron, sed estas sufiĉe ĝeneralaj.

Inter la skribintoj estas ne nur prezidantoj, sekretarioj aŭ aliaj funkciuloj de niaj organizaĵoj, sed ankaŭ ordinaraĵoj membroj. Prezidanto de grava landa asocio, ekzemple, prezentis kelkajn aliajn kazojn de nejusta traktado de sindonaj laborantoj por la Internacia Lingvo. Sekretario de alia landa organizaĵo trovis la artikolon "bonega kaj saĝa" kaj "plene aprobis ĝian enhavon". Tre aktiva kaj promesplena junulara gvidanto skribis: "Ŝajnas al mi, ke vi sufiĉe realisme tuŝis punkton, pri kiu dum longa tempo regis terura hipokritismo kaj mistakso". Multjara ĉefdelegito de UEA emfazis, ke "vere estis jam tempo aperte diri kelkajn kritikindajn aferojn." En alia letero estis dirite: "Via artikolo en la januara numero de "Esperanto" estas kvazaŭ skribita por nia situacio en... Ni volonte bataladis kontraŭ la eksteraj malamiko, sed se esperantistoj mem detruas niajn akiritajn venkojn, fariĝas freneze daŭrigi... Ni kompreneble restas fidelaj al nia Movado, sed ni limigas niajn laborojn al fakoj, en kiuj oni ne povas ĵaluze malhelpi nin."

Estas ĝojige konstati, ke neniu korespondaĵo manifestis ian ajn signon de defetismo. Male, ĉiuj elradias optimismon, bazitan sur la firma konvinko de la aŭtoroj, ke estas ne nur necese, sed ankaŭ eble forigi almenaŭ la ĉefajn negativajn fenomenojn interne de la Esperanto-Movado kaj tiel liberigi la vojon por pli efika esprimiĝo de la pozitivaj fortoj. Precize tion celis la artikolo.

Ankoraŭ pri Monrimedoj kaj "Diktatoroj"

Tamen, estus neobjektive ne mencii du negativajn reagojn. La unua aperis en "Dansk Esperanto-Blad" sub la titoloj "Ni Protestas" kaj "La Stranga Artikolo", la dua en "Heroldo de Esperanto", en letero de s-ro W. A. Gething al la redakcio. Lasante tute flanke la objektive insultajn esprimojn en DEB kaj plene neglektante en tiu ĉi kunteksto la misprezentojn, oni trovas ke ambaŭ skribaĵoj reduk-

tiĝas al unu sola punkto: oni ne progresas pli kontentige pro "manko de mono."

La fakto, ke la materiaj rimedoj de la Movado, kvankam pli bonaj ol antaŭ kelkaj jaroj, tamen estas ankoraŭ tre modestaj, estis pli ol klare akcentita en la artikolo. Sed pri tio efektive ne temis. La demando estis kaj restas, ĉu pli ampleksa kaj pli rapida progresado estus atingebla per la ekzistantaj financaj rimedoj kaj en la nunaj cirkonstancoj. La analizo montris, ke la respondo devas esti netejesa kondiĉe ke la organizita Movado sukcesu unu fojon por ĉiam kuraci tiujn internajn malsanojn, kiuj malfortigas aŭ kelkloke eĉ paralizas ĝin. Pretere dirite, sennombraj ekzemploj montras, ke en la tuta historio de Esperanto, kaj ankaŭ hodiaŭ, sindediĉo kaj celtrafa laboro pli gravas kaj plue havas multe pli grandan signifon ol la materiaj rimedoj, kio neniel implicas subtakson de la rolo de la lastaj. Ekzistas ankaŭ nun landaj asocioj relative bonstataj, kiuj tamen ne sukcesas atingi iajn pli rimarkindajn rezultojn. Aliflanke, organizaĵoj kun minimumaj enspezoj, sed kun inteligentaj, lertaj kaj agemaj gvidantoj, kiuj scias kun respekto rilati al la homaj valoroj, kontentige progresigas la lingvon en siaj respektivaj medioj. Oni ankaŭ ne forgesu, ke dinamismo sisteme kaj taŭge direktita al difinitaj celoj kutime rezultigas pozitivajn atingojn, kiuj siavice prezentas bazon por pliaj laŭplanaj paŝoj. Tio kelkfoje elvokas etmensajn enviojn, sed tio ankaŭ necese entuziasmigas ĉiujn pozitivajn fortojn, kio, finfine, ne povas ne reflektiĝi en la nombra kresko de la membraro kaj eĉ en la alfluo de novaj materiaj rimedoj spite al la eventualaj internaj obstakloj.

Tio estas esenca. Kaj tiun esencon perfekte komprenis Sac. W. Flammer, la ĝenerala sekretario de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kiu publikigis en "Espero Katolika" ĉefartikolon sub la titolo "Li estas Diktatoro." En ĝi interalie li skribis:

"Kiel sekretario, provizora ĝis la kongreso en Valencio, mi prenis sur min la taskon stimuli la cirkuladon de nova sango kaj nova vivo en la vejnoj de nia organizo. Per cirkuleroj mi kontaktis kun la membroj de la Estraro kaj Komitato de IKUE. Mi skribis sennombrajn leterojn, mi eldonis la broŝurojn de la nova IKUE-serio 'Kristana Kulturo', mi eldonis la vortareton 'Katolika Terminaro



Deutsch-Esperanto'. Mi pristudis la Statuton de IKUE kaj preparis la necesajn ŝanĝojn, kiujn la Estraro kaj Komitato jam aprobis per skriba voĉdono kaj kiujn la ĝenerala kunveno de Valencio sendube sankcios. Por tiu laboro mi postulis nek monon nek dankon. Mi tamen ricevis surprizan dankdiron. Oni skribis: 'Li estas Diktatoro! Gardu vin, li ruinigos nian karan IKUE!' Mia unua reago estis mirego. Sed nun mi ne plu miras, leginte artikolon en la revuo 'Esperanto', januara 1964, p. 4, en kiu D-ro Ivo Lapenna skribas...'' Sekvas longa citaĵo el la menciita artikolo kaj en la fino Sac. Flammer diras: "Kion spertas la neŭtrala Esperanto-Movado, tion spertas IKUE. Ĉu tiaj spertoj finfine lernigos nin??"

La kazo de Sac. Flammer estu plia admono pri la seriozeco de la negativaj aspektoj traktitaj en la januara "Esperanto".

La Esperanta Gazetaro

La januara artikolo aludis al pluraj negativaj trajtoj en parto de nia gazetaro. Pri tiu afero, kiu per si mem postulus ampleksan studon, plurfoje aŭdiĝis kritikaj rimarkoj. Konata esperantisto iam diris, ke en kelkaj Esperantaj gazetoj — kaj li menciis iliajn nomojn — li neniam trovas ion ajn legindan. "The Australian Esperantist" skribis en la n-ro 34/1963: "Estas tre grave, ke pliboniĝu la lingva nivelo de niaj gazetoj..." Laŭ la aŭtoro, la landaj organoj "enhavas timige multe da immature verkita teksto, nekompetente kontrolita", dum en la kulturaj revuoj troviĝas kontribuoj tro "alteflugaj" el enhava kaj stila vidpunktoj.

Ĉu tiuj kritikoj estas pravaj?

Antaŭ ĉio necesas diri, ke la nombro de la Esperantaj periodaĵoj — por preni denove dekjaran periodon — preskaŭ duobligis ekde la jaro 1953. La kresko rilate la nombron estas, do, konsiderinda kaj ĝi reflektas la ĝeneralan progresadon de la Esperanto-Movado en la lasta dekjara periodo. Fakte per si mem ĝojiga kaj kuraĝiga.

Laŭ la enhavo, kelkaj estas kulturaj, literaturaj, fakaj, religiaj aŭ turismaj revuoj, dum aliaj havas karakteron de asociaj bultenoj. Aparte menciinda estas la kreskanta nombro de periodaĵoj por la junularo kaj infanoj. La plimulto estas organoj de diversaj Esperantistaj organizaĵoj, sed sufiĉe granda nombro

apartenas al neesperantistaj instancoj. La lastaj plene dependas de fortoj ekster la organizita Esperanto-Movado kaj tial ĝi ne povas respondi en kiu ajn senco pri ilia enhavo.

Ĉiu gazeto aŭ revuo, en kiu ajn lingvo kaj kie ajn en la mondo, celas al io kaj tiu celo difinas ĝiajn enhavon, stilon, eĉ formon. En movado batalanta kiel la nia, la celo konsistas el triobla tasko: informadi, kunligi, mobilizi. Krome, pro la aparta lingva aspekto, ankaŭ liveri tekstojn en senriproĉa Esperanto.

La demando nun estas ĉu la Esperantaj periodaĵoj, kiuj dependas de la organizita movado, plenumas kontentige sian gravan rolon.

Lingvo kaj Formo

Progreso esas rimarkebla koncerne la aspekton kaj internan teknikan aranĝon de la plimulto de la Esperantaj periodaĵoj. Kelkaj redakcioj sukcese modernigis la eksterajn. Aliaj konservis la tradician formon, sed klopodas pli lerte enpaĝigi la materialojn. Al la tria grupo apartenas la redaktoroj, kiuj plue malatentas la eksteran aspekton, same kiel ili neglektas la enhavon.

Pli grava estas la lingvo. Tiurilate pluraj niaj periodaĵoj havas ankoraŭ mankojn. Kelkfoje oni ricevas la impreson, ke la redaktoro aŭ mem ne scias kontentige la lingvon, aŭ sendis la manuskripton al la presejo antaŭ ol korekti ĝin.

En nia kazo la demando de kiel eble plej bona lingvo ne estas nur afero de klareco kaj gusto, sed multe pli. La Esperanta gazetaro estas unu el la ĉefaj faktoroj, kiuj evoluigas la lingvon kaj samtempe fortikigas ĝian unuecon. Kvankam ĝia celo certe ne estas rekte instrui la lingvon, tamen ĝi fakte estas konstanta kaj vivanta lernejo, en kiu multaj kun fido ĉerpas sian scion. Se periodaĵo atente redaktata en lingvo kiel eble plej perfekta el gramatika kaj stila vidpunktoj estas potenca rimedo por konservado de la internacieco kaj cementado de la unueco, gazeto kun tekstoj, en kiuj daŭre troviĝas gramatikaj eraroj, naciismoj kaj nefundamentaj formoj, superfluaĵoj neologismoj kaj stilo nekonforma al la spirito de Esperanto, prezentas gravan danĝeron por la lingvo kaj ĝia plua progresado.

Redakti gazeton estas respondeca tasko ankaŭ tiurilate: se oni ne scias perfekte la lingvon, oni ne akceptu tiun funkcion; kaj se oni scias ĝin, oni ne hezitu korekti la erarojn. Gazeto devas esti redaktata kaj ne redaktiĝi per si mem.

Informado kaj Misinformado

Pli malbone prezentiĝas la afero rilate la informadon. Estas vero, ke, ĝenerale parolante, la granda plimulto de la Esperantaj periodaĵoj objekte prezentas la okazintaĵojn. Kutime iliaj redaktoroj ankaŭ elektas la plej signifajn faktojn, prenante en konsideron la apartan karakteron de la periodaĵo, la fidindecon de la informo kaj la disponeblan spacon.

Bedaŭrinde, tamen, en kelkaj niaj periodaĵoj

Pliaj kaŭzoj de nekontentiga progresado

abundas misprezentoj. Plejparte neintencaj, sed ofte konsciaj kaj intencaj. De tempo al tempo ili aperas eĉ en la plej bonaj revuoj. La kaŭzoj varias de naiva, eble sincera, kredado al plej fantaziaj onidiroj ĝis konscia renversado de la realaĵo. Misinformi oni povas diversmaniere: aŭ tiel, ke oni tute simple kaj rekte diras objektivan malveron, eĉ se oni eble subjektive kredas ĝin vera; aŭ tiel, ke oni implicas ion kiel veran, kvankam ĝi ne estas tia; aŭ tiel, ke oni prisilentas gravajn eventojn kaj samtempe emfazas bagatelajn; aŭ tiel, ke oni faras insidajn aludojn kredigante la legantojn, ke io okazis, kio fakte ne okazis. Tiu lasta ĉiam estas intenca, plej ofte kun fortaj nuancoj de malico.

La kazoj de intenca aŭ neintenca misinformado estas tiel multnombraj ke tuta libro apenaŭ sufiĉus por koncize prezenti ilin. Nur 3—4 ekzemploj, prenita el tiu granda dosiero, helpas iom illustri la diversajn specojn de misprezentoj.

Unu ekzemplo

Bela ekzemplo de konscia, intenca kaj rekta malvero troviĝas en la teksto de parolado de s-ro Foeke de Vries, publikigita en la nederlanda "Laborista Esperantisto", n-ro 4/1964. Parolante pri la eblecoj de kunlaborado, li diris:

"Kiam oni deziras kunlaboron ne decas ke oni frapas sin sur la brusto kaj krias: 'Mi estas LA bastiono de agado por Esperanto en la mondo.' Ankaŭ naŭze estas nomi sin la plej demokrata organizo. Profesoro Ivo Lapenna, la verkisto de tiuj esprimaĵoj en 'Esperanto' de februaro 1964a bone konsideru, ke li per tiaj eldiroj certe ne servas la Esperanto-Movadon ĝeneralan." (Laŭvorte, la eraroj ne estas korektitaj).

Ankaŭ ĉi-foje oni povas lasi tute flanke la insultojn. La "esprimaĵoj", kiel oni vidas, estas efektive eldiritaj kaj presitaj, sed ne en la revuo "Esperanto". Kiel ĉiu leganto de "Esperanto" povas facile konstati, en la menciita artikolo estis dirite: "Diference de diversaj ekskluzivaj organizaĵoj, U.E.A., kiu mem estas la bastiono de agado por Esperanto en la mondo... vaste malfermas la pordojn al ĉiuj, kiuj en kiu ajn senco kaj en kiu ajn loko laboras por la Internacia Lingvo..." Kaj rilate demokratecon la sola kunteksto, en kiu tiu vorto aperas, estas: "En U.E.A. la demokrateco esprimiĝas ne nur en la principo de la Statuto, ke la respekto de la Homaj Rajtoj estas esenca kondiĉo por ĝia laboro, sed, interalie, ankaŭ en la konsisto de ĝiaj organoj kaj en la maniero, laŭ kiu ili estas elektataj kaj funkcias."

Tiel, do, la legantoj de "Laborista Esperantisto", plene fidante al sia propra gazeto kaj al la Prezidanto de sia Asocio, estis des pli plene misinformitaj kaj en tiu misinformiteco sentis tutcerte profundan indignon kontraŭ la funkciulon de UEA, kiu tiel malbone "servas la Esperanto-Movadon ĝeneralan" ktp.

Multe pli subtila estas la misinformado per implicado de io kiel vera, kio ne estas tia, aŭ per aludoj al io kvazaŭ okazinta, kio efektiva neniam okazis. Kutime oni tion faras en formo de artikolo, en kiu — por pli sukcese kredigi la malveron — oni intermiksas nekontesteblajn verojn kun duonveroj kaj malvero. Per la unuaj, kiujn preskaŭ ĉiu facile povas konstati kiel ĝustajn, oni akiras la fidon de la legantoj, per la kontrolebla duono de la duaj oni firmigas ĝin por fine atingi sian celon: kredigi la malveron. Eĉ pli, por montri sin "objektivaj kritikantoj" oni ne hezitas ankaŭ laŭdi ion ĉe la viktimo. En la fino la tuto estas kronata per diroj pruntitaj de sinceraj esperantistoj kaj senfine karaj al ili pri rajto libere esprimi sian opinion, toleremo, paco, amo, ktp., per kio oni sigelas la malveron en la mensoj de la legantaro. Feliĉe, ne pli ol 2—3 personoj specialiĝis en tiu ĉi speco de misinformado.

La ĉefaj misprezentoj de "Heroldo" rilate al U.E.A. estis korektitaj en la aprila numero de "Esperanto" kaj poste, sub premo de registrita letero sendita de advokato, ankaŭ en "Heroldo" n-ro 8/1964. La afero per tio, tamen, ne finiĝis, ĉar en la sama numero aperis pliaj misprezentoj. Kiam, ekzemple, la verkinto de tiuj misprezentoj kvazaŭe pledas "ke estraranoj ne estu membroj (aŭ prezidantoj) de komitataj komisionoj, kiuj devas prijuĝi iliajn agadojn aŭ proponojn", aŭ "ke la elektoj okazu per sekreta balotado", tiam tute evidente li implice kredigas la neinformitajn legantojn, ke en UEA la estraranoj kiel prezidantoj aŭ membroj de la komisionoj de la Komitato fakte juĝas pri sia propra agado kaj ke la elektoj ne estas sekretaj. Efektive, la membroj de la Estraro estas nek prezidantoj nek membroj de komitataj komisionoj, kiuj pritraktas ilian agadon. La estraranoj eĉ sin detenas de voĉdono pri la Estrara Raporto en la Pleno de la Komitato. Plue, kun la escepto de la elektoj por la komitatanoj B), por kiuj laŭ la art. 28 de la Ĝenerala Regularo la balotiloj devas esti subskribitaj por certigi absolutan korektecon kaj kontrolon, ĉiuj aliaj elektoj, inkluzive tiun de la Estraro, estas sekretaj. La kunsidoj de la Komitato estas publikaj kaj ĉiu kongresano povas mem konstati tion, sed bedaŭrinde ne multaj utiligas tiun eblecon. Kiam la redaktorino skribas en la sama numero, ke oni povis peti la korekton en "normala maniero", sen sinturno al advokato, tiam ŝi kredigas la legantojn, ke efektive "Heroldo" publikigus korekton de malĝustaĵoj sen advokata interveno. Efektive, kiam antaŭ proksimume du jaroj al la redakcio de "Heroldo" estis sendita alia korekto pro aliaj misprezentoj, tiu korekto *neniam aperis*, kvankam la redaktorino estis promesinta publikigi ĝin. Kaj kvankam "Heroldo", ankoraŭfoje en la sama numero, skribis ke "nur profunda kaj serena diskuto permesas al eksterstarantoj distingi inter ambaŭ", nome inter la pravo kaj malpravo, tamen la redakcio rifuzis publikigon

de letero de la direktorino de la C.O. de UEA, kiu vere estus ebliginta al la legantoj de "Heroldo" distingi inter la du.

Misprezenti oni povas ankaŭ per selekto de leteroj, kiujn oni publikigas kiel "korespondajn de la legantoj", aŭ per ellaso de esencaj partoj el tiuj leteroj. Ekzemple, en la sama numero de "Heroldo", en la letero de s-ro Primetzhofer, publikigita sur la p. 2, la redaktorino ellasis la esencan parton, nome tiun, en kiu la sendinto skribis, ke laŭ lia impresado "Heroldo estas la atakanto, U.E.A. la sin defendanto".

Cio ĉi en unusola numero !

Ankaŭ aliaj metodoj estas sporade aplikataj. Ekzemple: ataki iun sen mencio de lia nomo, sed ne miskomprenoble identigante lin antaŭ la legantaro per iu konata vera karakterizo kaj samtempe aldonante la plej fantaziajn elpensadojn, ĉio ĉi kun la tipe etmensa espero, ke la atakito per sia eventuala reago implice "rekonos" la monstraĵojn. Siavice la atakanto uzas pseŭdonimon aŭ eĉ falsan nekontroleblan nomon ne sole por kaŝi sian identecon, sed ankaŭ por montri ke "aliaj samopinias" kun li aŭ eĉ, pretere, por laŭdi sin mem en la sama skribaĵo. Estis eĉ kazo, en kiu la sama persono lanĉis atakon sub unu pseŭdonimo, ni diru "A", poste publikigis "fortan aprobon" kun novaj misprezentoj sub falsa nomo "B" kaj fine, je protesto, skribis en privata letero, sub sia vera nomo, ke lin ne koncernas kion skribis sinjoroj "A" kaj "B" !

Sendependeco aŭ Senrespondeco

Kelkaj niaj periodaĵoj estas nomataj "sendependaj". Efektive, ne ekzistas sendependaj publikaĵoj. Ĉiu el ili dependas de iu. La publikaĵoj de UEA dependas de nia tutmonda organizaĵo. Aliaj periodaĵoj dependas de la organizaĵoj aŭ instancoj, al kiuj ili apartenas. Nur kelkaj dependas ne de organizaĵoj, sed de privatuloj, en kies proprieto ili troviĝas.

Guste pro la karaktero de tiu "dependeco", la respondecoj ne estas samaj. Ekzemple, la redaktoroj de la periodaĵoj de UEA, kvankam ĝis maksimumo memstaraj, respondecas al la Estraro, la Estraro al la Komitato, la Komitato al la elektoorganoj kaj tiuj ĉi lastaj al la tuta membraro. Ĉeno da seriozaj respondecoj, kiu faras, ke la eraroj estas limigitaj ĝis maksimumo kaj ke, se ili tamen hazarde enŝteliĝas, ili estas senprokraste lojale korektataj.

La redaktoroj de la t.n. "sendependaj" periodaĵoj respondecas al neniu krom al si mem. Se ili komprenas sian sendependecon kiel ian rajton publikigadi tendecajn malĝustaĵojn aŭ misprezentajn artikolojn, tiam ili misuzas la principon de preslibereco kaj transformas sian sendependecon en senrespondecon. La Movado certe bezonas ankaŭ bonajn privatajn periodaĵojn, kiujn en tiu senco oni povas nomi "sendependaj". Ju pli da ili kaj ju pli alta ilia kvalito, des pli bone. Tiajn sendependajn periodaĵojn kun vere respondecaj redaktoroj la konscia esperantistaro subtenis kaj subtenos en la estonteco. Kontraŭe, perio-

daĵoj senrespondecaj ne nur ne estas bezonataj, sed, multe pli, ili estas nedezirindaj, ĉar malutilaj kaj eĉ danĝeraj.

☆

La negativaj trajtoj, precipe la misinformado, en parto de nia gazetaro kaŭzis multe da malbono interne de la Movado kaj en la ekstera mondo. Malbona lingvo ŝokas la spertajn esperantistojn kaj senkuragiigas la komencantojn. Primitivaj, nepoluritaj tekstoj malproksimigas klerajn personojn kaj malutilas al la prestiĝo de la lingvo kaj al la seriozeco de la Movado. Prisilento de signifoplenaj eventoj, bagateligo de realaj, pene akiritaj sukcesoj kun samtempa flatado al neniofarado, eĉ kelkfoje al fuŝaĵoj, favoras apation, kreas konfuzon kaj malakrigas batalemon. Plej malbone efikas la misprezentoj: ili dissemas malkonfidon ne nur al la gvidaj instancoj de la Movado, sed ankaŭ rilate la agadojn, kiujn ili entreprenas en la intereso de la Internacia Lingvo. La misprezentoj detruas la fidon en la koroj de miloj da ordinaraj sinceraj batalantoj ĉie tra la mondo, disvastiĝas defetismon kaj ŝanceliĝas eĉ la plej fortajn karakterojn. Ekster la Movado, kiu jam de longe ĉesis esti fermita t.n. "familia rondo" kaj kies periodaĵoj estas atente sekvataj, ĉiuj eraroj, sed, antaŭ ĉiuj, la misprezentoj, estas malice misuzataj por malutili al la lingvo kaj por malhelpi la akiron de novaj pozicioj por la Movado. Nur per grandegaj fortostreĉoj oni sukcesis ĝis nun fari kontraŭpezon al tiuj negativaj efikoj.

Necesas agi energie kaj kiel eble plej rapide por redukti al minimumo la pritraktitajn negativajn aspektojn. La rimedoj ekzistas. Antaŭ ĉio la redaktoroj mem povas per iom da fortostreĉo konsiderinde plibonigi siajn gazetojn, precipe el la lingva kaj enhava vidpunktoj. Oni ne diru, ke "pro manko de spaco" tio ne estas ebla. Ne temas pri kiom oni presigas, sed kion. Ankaŭ kelkpaĝa multobligita bulteneto povas esti altnivela. Aliflanke, la estraroj kaj komitatoj de niaj organizaĵoj povas doni grandan helpon al la redaktoroj de siaj organoj per bonintencaj kritikoj kaj amikaj sugestoj. La legantaro mem povas helpi al plibonigo per ĝentilaj atentigoj pri malĝustaĵoj. Bonintencaj redaktoroj certe volonte korektos ilin. Se tio ne helpas kaj se montriĝas ke la periodaĵo, malgraŭ la bonintencaj atentigoj, plue misinformadas, oni povas eĉ ĉesigi la abonon. Kelkfoje nur firma antaŭanonco pri tiu intenco povas utile efiki. Eble estos necese baldaŭ krei ian profesion preskomisionon, adekvatan al similaj instancoj en diversaj demokrataj landoj, por protekti la nivelon de la Esperanta gazetaro kaj kontroli, ke la preslibereco ne estu misuzata.

Intertempe ĉiu faru sian eblon por fortikigi la multnombrajn pozitivajn flankojn de nia gazetaro kaj por forigi kiel eble plej multe la negativajn trajtojn. Oni memoru, ke la Esperanta gazetaro estas la spegulo de la Esperanto-Movado.

Ivo Lapenna

pliaj
kaŭzoj de
nekontentiga
progresado

Funebra

Parolado pri Prof.

Hideo Yagi

Pro la fakto, ke li ne havis eblecon persone ĉeesti la funebran ceremonion pri Prof. Yagi, la aganta prezidanto, S-ro H. W. Holmes, O.B.E., komisiis al S-ino Doris M. Worcester reprezenti tie la Asocion kaj voĉlegi lian funebran paroladon. S-ino Worcester estis alveninta en Japanujo nur du tagojn post la morto de Prof. Yagi. La funebra ceremonio, en kiu parolis reprezentantoj de diversaj medicinaj kaj esperantistaj organizaĵoj, okazis la 20-an de majo en la Universitato de Okayama.

H. W. Holmes Je mia granda bedaŭro mi ne povas korpe ĉeesti la hodiaŭan funebron. Mi do sendas al vi komisiiton, kiu legas en mia nomo funebran parolon antaŭ la ĉerko de la bedaŭrata Prof. D-ro Hideo Yagi, reprezentante Universalan Esperanto-Asocion, kies Prezidanto li estis.

Kiam subite atingis nin la unua sciigo pri la malsaniĝo de nia Prezidanto, ni sentis nin kvazaŭ fulmobatitaj. La sciigo kuris tra la mondo kaj niaj kolegoj en ĉiuj landoj elkore deziris, ke li resaniĝu tre baldaŭ. Ĉiu nova informo estis pli kaj pli esperiga kaj ni iom post iom trankviliĝis. Sed abrupte klakis tondro, kiu nin konsternis. Kia granda malĝojo nin trafis!

La tro frua morto de nia estimata gvidanto ne estas nur domaĝo de la japana Esperantomovado, sed estas gravega perdo de la tutmonda esperantistaro, precipe en la nuna momento, kiam la 50a Universala Kongreso de Esperanto estas atendata post unu jaro en Tokio.

Pri meritoj de la bedaŭrato en lia faka rondo certe parolos aliaj funebrantoj, mi do limigas mian parolon nur al liaj laboroj kiel

adepto de la Lingvo Internacia. Estante eminenta medicinisto D-ro Yagi fariĝis elstara gvidanto en tiu fako en nia movado, sed lia energia agado ne restis nur en limigita medio.

Li fariĝis delegito de nia Asocio jam en la jaro 1921, kiam li estis ankoraŭ juna studento de Kyōto Imperia Universitato kaj de tiam li restis ĉiam nia fidela kaj diligenta kunlaboranto. En la jaro 1956 Japana Esperanto-Instituto sendis lin al ni kiel sian reprezentanton en la Komitato de nia Asocio. Lia persono estis tiel alte taksata de liaj kolegoj, ke ili baldaŭ elektis lin Vicprezidanto de nia Asocio kaj kiam en la jaro 1962 Prof. Canuto forpasis, la Komitato unuanime elektis lin nia Prezidanto post la bedaŭrata profesoro. Ĉi tiu decido ĝuis tre vastan aprobon, ĉar li estis tre amata kaj ŝatata de ĉiuj, kiuj lin iam vidis.

La 48an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis en Sofia en la lasta jaro, Prof. Yagi malfermis kiel nova Prezidanto kaj lia elokventa parolo ĉarmis la tutan ĉeestantaron. Neniu tiam povis eĉ imagi, ke tio estas la lasta okazo, kiam ni vidas lin en nia festo. Ni ĉiuj esperis lin revidi en Hago ĉi-jare, ree en

Pri la forpaso de Prof. Yagi

**El letero de
la Delegito
en Okayama**

Okayama, la 8-an de majo, 1964

Estimata Direktorino Vermaas,

Estas tre malĝoja afero, ke mi urĝe devas sciigi al la Estraro kaj la tuta Asocio la morton de D-ro Hideo Yagi.

Li spiris sian lastan spiron frumatene je la 3-a, la 6-an de majo. Kiel vi jam scias, li estis atakita de apopleksio frumatene la 18-an de januaro kaj fariĝis tute senkonscia. Post 30 horoj li vekigis kaj tagon post tago estis plisaniĝanta, ĝojegante ke li povas libere movi siajn maldekstrajn membrojn kaj paroli, kvankam iomete neklare. La unusola zorgo profunde en lia koro estis, ke li fariĝis malkapabla sukcesigi sub sia prezido la 50-an UK, la unuafojan en la ekstrema oriento. Tion li ripete kaj ripete esprimis al mi kaj al sia familio.

Sed bedaŭrinde venis al li la dua atako frumatene la 28-an de aprilo kaj ree li falis

en tute komatan staton, nur kun granda kaj profunda spirado dum 8 tagoj. Spite de ĉiaj kuracadoj de eminentaj specialistoj, li ne povis travivi la gravan staton, kaj finfine venis la lasta minuto de lia vivo. Morto de granda homo, ne nur kiel medicina sciencisto, sed ankaŭ kiel esperantisto, entuziasma kaj fervora. Kelkajn horojn poste oni faris al li la postmortan aŭtopsion, kies ĉefa rezulto montris lian tutan cirkuladan sistemon jam delonge tre malmoliĝinta kaj rompiĝema.

Reveninte al sia amata hejmo de la hospitalo, antaŭ la enĉerkigo li estis kuŝigita sur la liton en sia kutima ĉambro. Ĉe lia kadavro sidis la vidvino, Akaŝi, preĝante la eternan pacon al sia forpasinta edzo. De la maldikaj incensbastonetoj starigitaj en la incensilo flagre leviĝadis kelkaj linioj de aroma fumo, ĝuste kiel la animo de D-ro Yagi estis supreniranta al la ĉielo. Regis trankvila kaj solena atmosfero. Budhista bonzo oferis sutron.

Nova kapitala enspezo por UEA

Tokio en la venonta jaro kaj ankoraŭ multajn fojojn en sekvontaj kongresoj. Sed ve, tiun mildan vizaĝon ni ne vidos plu kaj tiun dolĉan voĉon ni ne aŭdos plu... Kia vako! La tutmonda esperantistaro hodiaŭ partoprenas, kvankam ne per korpo, tamen per tuta animo profunde en la funebro.

La periodo de lia prezidanteco ne estis longa, sed li lasis post si neforgeseblajn memorojn en niaj koroj. Kiam japanaj esperantistoj invitis la 50an Universalan Kongreson de Esperanto al Tokio, ni ĉiuj unuanime aprobis la proponon, fidante al la energia aktiveco, akordiga gvidado kaj multaj spertoj de la Prezidanto. Sed antaŭ la evento finiĝis lia vivo. Momente ni ne scias, kion fari. Sed ni ne devas resti senfare. Ni klopodos laŭ nia eblo, kunlabori kun niaj diligentaj japanaj kolegoj, plenumi lian elkoran deziron sukcesigi la kongreson kaj realigi veran interkomprenon inter oriento kaj okcidento, por kio lia nobla koro ĉiam forte batis.

Estu paco sur lia cindro.

Universala Esperanto-Asocio
H. W. Holmes, Vicprezidanto

Laŭ la propono de la vidvino kaj la filo, estis donita al la mortinto postmorta nomo enhavanta du ĉinajn literojn signifantajn "Verda Stelo". Ĝi estos engravurita sur la tomboŝtono laŭ la budhista kutimo. Ĉe la enĉerkigo oni ankaŭ enmetis kune ekzempleron de "Paroladoj de D-ro L. L. Zamenhof", esperante ke li eterne ripozos en la ĉielo kune kun la aŭtoro de Esperanto. Pacon al lia cindro.

Posttagmeze en la sekvanta tago oni observis la funebran servon. Kaj du horojn poste la cindro revenis hejmen en malgranda blanka paŭlovnia kesto kovrita de blanka tuko, portate de la filo, kaj estis metita sur la altaron, ĉirkaŭita de ĉiukoloraj floroj, kun la granda foto de li pendigita en la mezo. La cindro restis tie sufiĉe longan tempon, ĝis la entombigo. Ĉar li estis oficiala persono, oni observis oficialan ceremonion la 20-an de majo.

Sincere via, Ichiro Arata.

Antaŭnelonge estis finaranĝita la vendo favore al UEA de la domo en Aspremont, sudorienta Francujo, kiun Universala Esperanto-Asocio heredis de la iama "Internacia Centra Komitato". La vendon prizorgis la origina donacinto de la domo, S-ro Ernest Yelland. Ĝi enspezigis al UEA 17.000 gld. Krome restas 4 hektaroj da tero sub proprieto de la Asocio.

S-ro Yelland estas konata pioniro de la Internacia Lingvo, kaj, kun la edzino, estas certe inter la plej malnovaj geedzaj paroj, kies komuna lingvo estas Esperanto. Li naskiĝis en Anglujo en 1880, kaj lernis Esperanton aŭtodidakte en 1906. Jam la sekvan jaron li fondis grupon, kaj en 1911 partoprenis la 7-an Universalan Kongreson, kie li renkontiĝis kun Zamenhof. En brita Esperanto-kongreso en 1915 li konatiĝis kun rusino, Teresa Sufadinova, kaj edzinigis ŝin en 1921. Ili hodiaŭ ankoraŭ estas geedzoj, kaj ankoraŭ la familia lingvo estas Esperanto, kiel estis dum la pasintaj 40 jaroj.

S-ro Yelland estis siatempe prezidanto de la Londona Esperanto-Klubo kaj estrarano de la Brita Esperantista Asocio. En 1930 li kunorganizis la SAT-kongreson en Londono, kaj estis amiko-korespondanto de Lanti ĝis ties morto.

La historio de la domo en Aspremont komenciĝis en 1931, kiam S-ro Yelland proponis ĝin al UEA kiel konstantan centron de la Asocio. Tamen, ĉar tiutempe ĉiuj gvidantoj de UEA loĝis en Ĝenevo, ili ne sentis la bezonon de tia centro, kaj ne akceptis la donacon. Anstataŭ ili, la domon akceptis S-ro Robert Kreuz nome de la tiam ekzistanta "Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado" (kiu organizis i.a. la tiamajn Universalajn Kongresojn, kune kun L.K.K.), kun la celo starigi "Internacian Hejmon Esperantistan". Tiu ideo tamen ne sukcesis, kaj ekde la interkonsento de Köln (1933), laŭ kiu la I.C.K. daŭrigis sian laboron en la kadro de UEA, la domo en Aspremont transiris en la posedon de UEA.

Tiel restis la afero ĝis la plej lasta tempo, kiam la grandanima donaco de Ges-roj Yelland povis esti transformita en pliajn monrimedojn por la ĝenerala agado de la Asocio.

☆

Por konvene memorigi la grandan donacon de Ges-roj Yelland, la Estraro decidis starigi specialan memortabulon en la nova Domo de UEA en Rotterdam.




TABELA TRARIGARDO PRI LA INFORMA LABORO EN 1963

Landa Asocio aŭ teritorio (Informa Fakoj)	Adreso de la Informa Fakoj aŭ kunlaboranto	Numero de		Prelegoj		Radio kaj TV prel.	Ekspozicioj		Distrib. afiŝoj folioj broŝuroj
		artikoloj	informoj	numero	ĉeestintoj		numero	ĉeestintoj	
Aŭstralia	Diversaj raportintoj	52	2	4	130	1	2	250	1000
Argentina	A. Tuduri, Str. Norther 756, Adroque, Prov. de Buenos A.	12	—	6	400	1	6	250	?
Belga (IF)	Ned: G. Maertens, Prins Leo- poldstr. 51, St. Kruis, Bruĝo	22	50	3	150	—	6	1500	410
	Franca: Grafo de Cuyper, 66 rue de Dorlodot, Monceau- sur-Sambre								
Brazila (IF)	Prof. C. Domingues, Rua Al- varo Alvim 27-ap.61, Rio de Jan.	1100	5500	50	4000	360	18	65000	44800
Brita	BEA, 140 Holland Park Ave. London W.11	—	500	?	?	10	3	?	10000
Bulgara (IF)	Karucin, Bul. Friso Botev 102 Sofia	145	94	126	17200	35	46	12600	39000
Ĉeĥoslovaka (IF)	Ĉ.E.K., Praha 2, Blanická 4	61	173	107	4200	29	15	8000	18000
Dana (IF)	Ole Schrøder, V. Sønderport 19, Kopenhago S.	29	220	?	?	?	?	?	359
Finna (IF)	E. Asocio de Finnlando, Espe- rantotie 4, Irilanti	38	70	2	100	4	4	500	100
Franca (IF)	UFE, 34 rue de Chabrol, Pa- ris X	549	544	163	8630	37	20	24000	17343
Germana (IF)	B. Zenker, 645 Hanau, Ram- saystrasse 15	835	1481	68	3079	19	23	8730	112317
Hinda	Veerendra Adhiya, "Prerna", K-29 Jangpura Ext. Link Rd. New Delhi 14	10	15	?	?	?	?	?	?
Hispana (IF)	Salvador Aragay, str. Arce 8-2-4, Cornella (Barcelona)	125	90	18	1600	105	4	2000	20000
Hungara (IF)	Inf. komisiono de HEA, Buda- pest V, Petöfi Sándor utc. 17	—	500	30	1200	112	6	3000	15000
Israela	E-Ligo Israela, Tel-Aviv, str. Kaliŝer 48	10	32	7	600	3	1	?	740
Kanada (IF)	Friederike Brandenburger, 65 High Pk Blvd., Toronto 3	18	—	2	45	2	2	5800	690
Korea	Taekeng Kim, 104-43 An Am- dong, Seoul	6	5	2	890	9	7	2000	—
Madagaskara (IF)	Randrianekena Roger, IVH 165, Mandialaza, Tananarive	5	7	1	50	2	—	—	2150
Meksika	A. Zepeda, Altamirano 75-1, Mexico 4, D.F.	8	—	4	40	1	1	?	?
Monako	Jos Derks, 8 bd. d'Italie, Mon- te Carlo	—	14	1	40	—	—	—	—
Mozambika	M. Raposo, C. p. 872, Louren- co Marques	32	10	—	—	2	1	1500	1
Nederlanda (IF)	S-ino H. J. Woessink-Boet, Vondellaan 47, Arnhem	96	86	3	55	18	1	500	155
Norvega (IF)	L. Anjer, Boks 7, Nordstrand- høgda	20	558	1	100	3	—	—	45420
Novzelanda (IF)	S-ino B. M. Harvey, 21 Stoke Street, Newtown, Wellington S. 1	—	261	6	350	16	3	400	4400
Sudafrika	F. Woolf, Capetown, kaj C. Beckford, Johannesburg	—	3	—	—	3	—	—	301
Sveda (IF)	J. Strønne, Amiralsgatan 36, Malmö	123	438	192	10100	2	3	138000	16650
Svisa (IF)	D-ro A. Baur, Hangweg 57, Liebefeld/Bern	100	15	?	?	?	—	—	12300
Usona (IF)	B. Stollman, Esp. Inf. Center, 305 East 40th Str., New York	12	?	30	?	?	?	?	6000

28 respondoj 3908 10668 826 52959 774 172 274030 366611

Plus 2 ricevataj dum presado, finaj sumoj: 4272 10674 858 53059 786 184 389030 367423

33 respondoj Ciferoj por 1962 4497 11595 1753 94348 949 355 392404 468660

28 respondoj Ciferoj por 1961 4476 9902 1124 71630 791 259 339250 448190

en
uni
versi
tataj
urboj
nepre
vast
igi
la
infor
madon
en
la
uni
versi
tato
(labor
plano
13 ĝ)

Pri kelkaj komentoj al la informa laboro dum 1963 ni atentigas al la ĉefa artikolo de tiu ĉi numero. La subaj rimarkoj tial povas esti tre koncizaj.

Necesas substreki, ke pro la nerespondado al la enketo fare de pluraj landoj, inter kiuj kelkaj el informa vidpunkto tre gravaj, kaj pro oftaj samaj malfacilaĵoj de la efektive respondintaj landoj rilate al iliaj demanditoj, ĉiuj ciferoj devas esti konsiderataj kiel minimumaj.

Klarigo de la rubrikoj

La statistiko inkluzivas ĉiujn *artikolojn* kaj *informojn* aperintajn en la nacilingvaj gazetaĵoj pri la Internacia Lingvo aŭ pri D-ro Zamenhof dum 1963. Ankaŭ la malfavoraj artikoloj kaj informoj estas enkalkulitaj, sed ilia nombro estas, kiel ĉiujare, tute sensignifa. La plej altan nombron ili atingis en Germanujo same kiel en la pasinta jaro: 19 el 2.316, do 0,7%!! Entute, el 14.576 raportitaj artikoloj kaj informoj, nur 59, do 0,4% estis malfavoraj kompare kun 0,7% de la pasinta jaro. Ni utiligas la okazon varme gratuli al niaj germanaj amikoj, kiuj *pli ol duobligis* sian nombron da artikoloj kaj informoj.

La *prelegoj* ĝenerale, same kiel tiuj en *radio* kaj *televido*, estas nur nacilingvaj. Sekve ne estas enkalkulitaj la 1701 radioelsendoj en Esperanto registritaj de CED.

Nur la publikaj *ekspozicioj* estas inkluzivitaj.

Evidente, tute speciale rilate la nombrojn de personoj kiuj ĉeestis la prelegojn aŭ ekspoziciojn, la ciferoj donitaj estas proksimumaj.

Fine, la rubriko "*Afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj*" inkluzivas krom la diversaj eldonaĵoj de la landaj asocioj la presaĵojn de UEA mem utiligitajn en la diversaj landoj, t.e. la seslingvan flugfolion, tiun por universitataj medioj, la broŝuron por Afriko, la afiŝon.

Kiel vidite, la sumaj rezultoj de la jaro ŝajnas iom malpli bonaj ol tiuj de la jaro 1962. Konsiderante tamen la nerespondon de landoj kiel Jugoslavio, Italujo kaj Pollando, oni rajtas singarde konkludi, ke ni atingis dum 1963 proksimume tiom, kiom dum 1962.

Specialaj Informaj Aktivaĵoj

Kompreneble, estis aplikataj tie kaj tie ankaŭ aliaj metodoj de informado, laŭ la lokaj cirkonstancoj eksteraj kaj internaj. En Germanujo kaj Svedujo oni diversmaniere reklamis per *anoncoj*, dum en Ĉeĥoslovakio, Brazilo, Germanujo oni aplikis publikajn *montrofenestrojn*, konstantajn *afiŝojn* aŭ *informtabulojn* en stacidomoj kaj universitatoj. *Kolorajn diapozitivojn* oni uzis en diversaj landoj kiel bazon por prelegoj, kiel en Germanujo, aŭ kiel reklamon en kinejoj, kiel en Belgujo kaj Ĉeĥoslovakio; en pluraj lokoj oni tiucele uzis la tre taŭgan serion da diapozitivoj primovadaj, faritan de S-ro Lentaigne, Montpellier. *Filmoj* estis montritaj en Brazilo. En Ĉeĥo-

ankoraŭ
mendebla:

LA
INTERNACIA
AFIŜO

Formato	1 ekz.	0.40 gld. (1.60 steloj)
58,8 × 83,2 cm:	100 ekz.	36.— gld. (144.— steloj)

slavakio estis utiligitaj *uzinaj disaŭdigoj*. En Germanujo kaj Brazilo oni bonege informis la vizitantojn de *publikaj bibliotekoj*, donacante al tiuj librojn kaj gazetojn. Pri la ekzisto de la Internacia Lingvo atestis klarigo en du germanaj *fervoĵaj horaroj* de po 120,000 ekz., kiel ankaŭ *Esperanto-adresoj en telefonlibroj*. La svisoj disdonis entute 10,000 *alumetuojn* kun varbteksto. Ankaŭ aranĝoj okaze de la tago de la *Homaj Rajtoj* kunlabore kun *ne-esp-aj organizaĵoj* estis el informa vidpunkto tre utilaj; en Germanujo okazis bona loka kunlaboro kun la Eŭropa Unio, kaj en Aŭstralio estis farita bonega kontribuo de la Esperantistoj al la okazigo de ekspozicio enkadre de la mondskala kampanjo "Forigu Malsaton".


En pluraj landoj estis senditaj aŭ persone transdonitaj taŭge formulitaj leteroj aŭ memorandoj al gravaj oficialaj instancoj, ekz. al Prezidanto (Madagaskaro), ministroj aŭ urbestro (Bulgario, Israelo, Nov-zelando) kaj al aliaj. Cetere speciala informado de diversaj landoj direktis sin al instruistoj, universitatoj kaj studentoj, junularo, lernantoj, sportistoj, fervojistoj, sindikatoj, arkitektoj, soldathejmoj, altlernejoj, oficejoj, bankoj, firmaoj kaj hejmoj. Kiel ekzemploj estu menciite, ke la Germana Esperanto-Junularo sendis dufoje sian bonegan nacilingvan informilo "International" al 600 junular-organizoj kaj revuoj, dum en almenaŭ Francujo, Norvegujo kaj Danlando aperis tre bonaj ĝeneralaj presitaj informiloj, uzataj ankaŭ por la kursanoj.

Ĉiuj ĉi ideoj estas imitindaj ankaŭ en aliaj landoj.

La Informa Fakto de UEA

faris, krom sia daŭra laboro rilate liveradon de materialo kaj sendadon de cirkuleroj kaj bultenoj, novan iniciaton, sendante apartajn invitleterojn al pluraj plej gravaj eŭropaj gazetoj ĉeesti la Universalan Kongreson. Por ĉio vidu detalojn en la baldaŭ aperonta Estrara Raporto.

Sven Ziegler



Lingvo-laboratorioj

kompensas mankojn de la tradicia lingvo- instruado




Infano sidanta en sonizolita budo ekfunkciigas magnetofonon kaj aŭdas, tra moderna, bone remburita kapaŭdilo, la konatan voĉon de instruisto. La voĉo, fidele registrita sen la ĝena bruo de ekstera trafiko aŭ infana tusado, faras al li demandon en fremda lingvo. La infano respondas hezite, kun mallerta prononco, per mikrofono tuj antaŭ lia kapo. Kvazaŭ por korekti lian prononcon, aŭdiĝas nun la sama respondo prononcita de la instruisto mem, kaj, rimarkinte iun sian eraron, la infano tuj ripetas kun jam pli da sukceso. Tiel sin sekvas unu demando post alia, ĝis la bendado elĉerpiĝas, kaj la infano rekurigas ĝin al la komenco per simpla ŝalto. Nun li aŭskultas atente la tutan bendon, sur kiu estas registritaj kune la demandoj kun liaj propraj respondoj kaj la modelaj respondoj de la instruisto. Tiel samtempe fiksiĝas en lia memoro la ripetataj esprimoj, kaj krome evidentiĝas tute klare la eraroj, kiujn li faris.

Per tiu ĉi baze sama sistemo lernas hodiaŭ infanoj kaj studentoj en Moskvo aŭ Nov-Jorko, en Afriko aŭ Japanujo. Per ĝi ili lernas ekparoli en nova lingvo: ĝi estu la rusa, la angla, la sŭahila aŭ la Internacia. Kvankam la magnetofono, kiu estas la baza elemento de ĉi tiu nova instrumentado, jam ne estas io nova, daŭris iom longe, ĝis oni komencis serioze pripensi ĝian aplikadon en la lernejoj. Hodiaŭ la konstruado de "lingvo-laboratorioj", similaj al la ĉi tie ilustrita, fariĝas rapide

aparta prospera industrio. Nur antaŭ kvar jaroj la konata brita naturscienca revuo "Nature" koncize komentis pri la teoriaj meritoj de tiaj "laboratorioj", kiuj tiam estis eksperimente uzataj en Usono kaj aliloke. Sed en tiuj kelkaj jaroj la ideo disvastiĝis kiel stepa brulo. Unesko vojaĝigas veturantan laboratorion tra Afriko; studentoj en sovetaj universitatoj jam kutimiĝis al la magnetofonaj budoj; en Britujo la plej elstaraj lernejoj enkondukis la sistemon sen ia hezito.* Firmoj, kiuj vidas allogajn perspektivojn en la ideo, pretendas instrui al britaj komercistoj flue paroli la germanan aŭ alian lingvon en nur tri monatoj.

Kompreneble, tiaj pretendoj, ligitaj kun la prestiĝaj vortoj "scienca sistemo", havas ian efikon en la reklamado, sed povas tiel skeptikigi la Esperantistojn, ke ĉi tiuj emos preteratenti la realajn meritojn de magnetofona instruado. Unue, kaj plej ĝenerale, la sistemo havas tiun gravan meriton, ke ĝi efektive paroligas la lernantojn (tiurilate ĝi akordiĝas kun la principo de la Ĉe-metodo). Laŭdire, la tradiciaj kursoj de la angla lingvo en belgaj lernejoj donas al ĉiu infano eblecon paroli la lingvon dum maksimume 2 horoj jare,

* Inter aliaj la lernejo "Thomas Bennett" en Crawley, kie ankaŭ Esperanto estas instruata laŭ ĉi tiu metodo.



mandi rekte al la kursestro, li povas per lum-signalado alvoki ties atenton kaj interparoli per la mikrofono, ne ĝenante la aliajn lernantojn. Krome ekzistas ebleco por la instruisto, aŭdigi samtempe du malsamajn antaŭe registritajn lecionojn al du apartaj grupoj — ekzemple, pli talentaj kaj malpli talentaj — en la sama klaso. Tion ebligas sistemo de ŝaltiloj, per kiu ĉiu individua budo povas esti konektita kun unu aŭ alia el la "instruistaj" magnetofonoj. Dum la lernohoro, la magnetofonoj apud la instruisto transsendas la antaŭe preparitajn lecionojn al la kursanoj, kiuj aŭskultas per kapaŭdilo kaj samtempe registras la voĉon de la instruisto sur unu vojon de la propra sonbendo. Sur alian vojon la lernanto registras siajn respondojn, tiel ke li povas poste aŭskulti ambaŭ registraĵojn samtempe, aŭ povas forviŝi kaj refari siajn respondojn, tute ne tuŝante la registritan voĉon de la instruisto.

Ĉiuj helpiloj estos bezonataj

Evidente, la kapitala kosto de lingvo-laboratorio estas alta, sed ĉiam pli da lernejoj aŭ aliaj instancoj trovas ĝin ekonomia. En la nuna stadio ekzistas certe kelkaj, kiuj pretendas solvi tiamaniere la lingvan problemon. Nia natura reago al tiaj miscelaj "solvoj" ne blindigu nin al la fakto, ke ĉiu sistemo, kiu plibonigas instruadon de nacia lingvo, povas ankaŭ plibonigi la instruadon de la Internacia Lingvo. En la epoko de universala enkonduko de Esperanto estos bezonataj ĉiuj teknikaj kaj aliaj helpiloj, kiuj estos disponeblaj.

kaj verŝajne en aliaj landoj la situacio estas simila. Almenaŭ unu angla universitato ekzamenas la parolan kapablon de la studentoj pri fremdaj lingvoj, sed tute ne donas ian okazon dum la lernojaro por ekzerci tiun parolkapablon. Dua granda merito estas ke la reaŭdigo de la demandoj kaj respondoj atentigas la lernanton pri lia propra voĉo.

Aŭskulti sian propran voĉon

Normale, plenaĝuloj kaj pli aĝaj infanoj, kontraste kun junaj infanoj kaj kelkaj imitemaj bestoj, malmulte atentigas la propran voĉon dum imitado, sed reproduktas fremdajn sonojn per similaj — sed ne tute korektaj — sonoj el sia propra lingvo. Male, kiam la lernanto povas aŭskulti per bendo la modelan respondon en tuja sinsekvo kun la propra registrita respondo, li multe pli facile povas konstati la diferencojn inter la du prononcoj, kaj tial povas pli facile ilin forigi.

Ankoraŭ tria merito estas la fakto, ke en "lingvo-laboratorio" la lernanto ricevas tute individuan instruadon. Ĉiu instruisto kaj kursgvidanto tro bone scias, kiel malfacilege estas progresigi samtempe nombron da lernantoj kun diversaj kapabloj, ofte eĉ de diversaj aĝoj, kaj ĉiuokaze kun diversaj emoj kaj karakteroj. En sia magnetofona budo la lernanto ne timas mokojn de aliaj kursanoj. Devante daŭre atenti al demandoj kaj daŭre respondi, li ne emas revii aŭ endormiĝi. Kaj se li bezonas ion de-






Foto el "Filoj de Dio, Adorantoj de Dio"

Filoj de Dio, Adorantoj de Dio, de Hideo HAGA. Eld. Ten'sei-sha, Ten'onkyo, Kameoka, Japanujo, 1964. 290 p. 26 × 18 cm., lukse bindita.*

Haga estas fotisto, kiu dediĉis kvar jarojn al fotografado ĉe la Oomoto-organizaĵo en Kameoka. La rezultintaj fotoj, ĝenerale tre laŭdindaj, estas gravure presitaj sur la unuaj 158 paĝoj de tiu ĉi belega volumo, laŭ kvar grupoj: 1. Dia Ĝardeno; 2. Centra Oficejo; 3. Kredantaro; 4. Oomoto-movado. Ili donas al neĵapano tre detalan bildon ne nur pri la vivo de Oomoto, sed pri japanaj aferoj ĝenerale. El la ceteraj paĝoj, trideko prezentas elektaĵojn el la verkoj de la familio Deguĉi, en traduko de T. Nakamura.

Klopodo de simioj por elakvigi la lunon. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1964. 12 p., 25 × 21 cm. Kolorpresita infanlibreto. Prezo: 0,80 gld.*

Tiu ĉi libro helpas plenigi mankon en la Esperanto-literaturo — tro malmultaj infanlibroj. Ĝi estas unu el kvanto eldonita de la Ĉina Esperanto-Ligo, bele presita en koloroj. La libreto enhavas du tre ĉarmajn rakontojn pri la agado de simioj, verŝajne tradukitaj de antikvaj ĉinaj legendoj.

Bela konvolvulo. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino 1964. 20 p., 20 × 18 cm. Kolorpresita infanlibreto. Prezo: 0,40 gld. (1,60 st).*

Jen ĉarma infanlibro enhavanta 23 paĝojn da bele kolorilustritaj desegnaĵoj kun interesa rakonteto pri floro kiu beligas la mondon pere de helpo de ĉielarko. Ĝi estas tradukita el la ĉina lingvo kaj preskaŭ perfekta laŭ teknika flanko kaj lingva kvalito.

Francis Helmuth (Kalifornio)

Skandinavia

Sub stelo rigida, poemaro de Thorsteinn frá HAMRI. El la islanda trad. Baldur RAGNARSSON. Eld. Stafeto, La Laguna, 1963. Beletraj kajeroj n-ro 21. 131 p., 18 × 12 cm. Prezo: 4,50 gld. (18 st).*

Jusa ĉenero el tradicio miljara, disde kiu ĝi abrupte diverĝas, jen la unua beletra volumo internaciigita el la islanda. Laŭ la modele redaktita prologo, Thorsteinn frá Hamri estas poeto el inter la plej promesaj de la juna generacio. Li aperigis jam tri poemlibrojn, kies artisma rafiniteco vekis multan atenton. La du lastajn, "Donaco por nova mondo" kaj "Lando de vivantoj", la tradukinto parigis sub la titolo "Sub stelo rigida": sesdeko da poemoj prozaj aŭ versaj en kiuj, tra simboloj por ni escteraj, la profunda memo de la artisto iras renkonte al la esenco de la aĵoj. Poezio foje metale densa, foje fluide sensebla, kiu rivele esprimas la angorajn reagojn de individuo meze de rapide ŝanĝiganta mondo, de homo ankoraŭ intime ligita al sia kampula deveno medie de modernaj urbaj vivkondiĉoj. La tutan kolekton regas harmonia sent-unueco en vario de temoj ondanta de medita enmemiĝo ĝis impeta marseljezo memore al Lumumba. Tamen la ĉefa koncerno de la poeto evitas same la ĉiutagan rubrikon kiel la prikosmajn konsiderojn. Konscia nunulo trovos ĉi tie validan ilon por ekkono kaj iniciĝo. Li perceptos la riĉan esprimivon de nude pura voĉo.

Spirite kaj talente la aŭtoro kaj lia interpretanto tiom parencas, ke oni rajtas paroli pri kungenia redono de la originalo. Por poeto vere gravas la lingva elvokivo. Kutime ĝi fontas el tradicio, kiu ŝargis la esprimilojn per longa heredeco. Kiam kreanto rompe apartiĝas de konvencio, li provas elserĉi freŝajn elvokivajn rimedojn. Tio ne tro malfacilas en nacia lingvo, kies anoj restas al ĝi kunsangaj. En esperanto, lingvo de ankoraŭ febla tradicio, sed de surprize disvastaj dinamikaj ebloj ĝis nun apenaŭ ekĉerpitaj, la artisto devas adame forĝi al si esprimaron, kiu vekos adekvatan respondon ĉe la legantoj. Kaj ĉi tie necesas eĉ redoni al la vortoj ilian laciĝintan povon, ilian originan pezon aŭ travideblon. Tion admiringe sukcesis Ragnarsson, kiu ja de multaj jaroj kuraĝe frontas la endecon de pli pura efika esprimivo. Li traktas nian lingvon kun supera kapablo kaj aŭdace vivigas ĝiajn kaŝitajn latentojn.

La kovrilo kaj dekoracioj de Ásta Sigurdardóttir (edzino de la aŭtoro) iom pensigas pri Beri Göndör, kiu ilustris la duan periodon de "Literatura Mondo". Tamen la islanda artistino sugestas trian dimension, kiun nek posedis nek ambiciis la viena grafikisto.

Tiu ĉi bele prezentita volumeto nin interesas el du motivoj: 1. kiel plenpova ambasadoro de la islanda kulturo, 2. kiel majstra solvo de nekutime malfacila traduka problemato.

Henri Vatré (Svislando)

*) ricevebla
ĉe U.E.A.

Sen paraŝuto, poemaro orig. kaj trad. de Poul THORSEN. Eld. Stafeto, La Laguna, 1963. Beletraj kajeroj n-ro 20, 143 p. 18 X 12 cm. Prezo: 4,50 gld. (18 stelojn).*

Je la disfalo de la socia komunumo, la simboloj de la moderna artisto iĝas pli privataj, malpli memkompreneblaj. Konscia konstruado kaj subjektivismo anstataŭas la popolan fabelon, la *mitos*, skulpte kaj pentre pli draste ol en la hezitema, zorga, relative malsensacia poezia medio. La poezio — la vortarto — obstine ligiĝas al la hejmlando. En Danujo, kie subjektivaj sentimentoj ankoraŭ konservas cedeman, nedisiĝan karakteron, profunda fendo inter la individueca nuno kaj la komuna tradicio ne videblas en la literaturo. Danujo ja havas siajn bohemulojn, siajn intelektulajn vagabondojn, kiel Nis Petersen — sed estas ĝuste la solecaj kaj senripozaj migruloj, kiuj je la ruiniĝo de la malnovaj ordoj tamen ne pretas nei la teron kaj ties diojn, sed prefere ilin simboligas propramane. Forstare de la memkonscia klaro de Valéry, Gide, Froust, kies temojn pentristoj kaj artkritikistoj ĉie, sed ne la danaj poetoj, alproprigas, ili sin savas kreante novan lingvon, novan simbolaron.

La liriko eminentas dane. Halfdan Rasmussen estas la plej juna en tuta generacio de liristoj, kiuj daŭrigas la klasikan tradicion. La ironio, kun kiu ili traktas sin, mem kaj siajn najbarojn, estas ofte komentata kiel speciala dotaĵo de la dana popolkaraktero. De la generacio de Halfdan Rasmussen ni povas lerni: ironiu, se postuliĝas tio, sed

Du radikale antagonismaj politikoj de paca kunekzisto. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1964. 46 p. 18 X 13 cm. Prezo: 0,40 gld.*

Resumo: La broŝuro celas distingigi inter la politiko de paca kunekzisto de Lenin kaj Stalin, unuflanke, kaj tiu de Ĥruŝĉov, aliflanke, surbaze de ilia rilato al revolucio. Ĝi akuzas, ke la celo de KPSU estas "kunlaboro inter Sovetunio kaj Usono por superregi la mondon".

Studoj kaj klarigoj I. Eld. Internacia Katolika Informejo, Tilburg, 1964. 56 p., 20 X 17 cm. Artikoloj. Prezo: 1,10 gld.*

Resumo: "Studoj kaj klarigoj" konsistas el kune binditaj represaĵoj el la periodaĵo "Vojo Vero Vivo": pri "La religia prahistorio de la mondo", laŭ Genezo, pri "Mirakloj en Lurdo", "La Ekumena Koncilo", "La Sankta Meso" kaj pri "Toleremo kaj netoleremo". La traktaĵoj celas klarigi la menciitajn temojn precipe al nekatolikoj.

GLUMARKOJ ELĈERPITAJ

La libroservo de UEA informas, ke la glumarkoj de la 49-a UK kaj la specialaj glumarkoj de TEJO eldonitaj okaze de la Junulara Jaro estas nun tute elvenditaj.

neniam forgesu observi! "Via Pens" reprezentas lin ĉi-libre, havante neforgeseblan duversion,

"Saĝaj cerboj naskis pensojn laŭ komando, sed la penso nur per eĥo iĝas kanto."

Pri Piet Hein, la virtuoza "ĉiutaga poeto" de la ĵurnalo *Politiken*, germana kritikisto Hans Rütting skribis, ke li "ĉiumatene vekigas kun epigramo". Tiu sama ankaŭ opiniis lin "tute dana kaj absolute netradukebla"; tamen s-ro Thorsen ja produktis en 1956 *Gruk*, kaj ĉifoje liveras al ni poemon de Hein, "La Plej Ĉarma Flago". Belega.

Sen Paraŝuto havas kvar partojn: la unua, "Heredito Dana", konsistas el riĉa sortimento de tradukoj, de la fama Aarestrup antaŭen. La aliaj tri partoj, "Porokaze", "Postrikolte" kaj "Postpluke (miniaturaj)" estas originalverkaj. Kun unu-du esceptoj ("Annika" kaj "La Plej Esenca") temas pri konata tereno, laŭ mi tro tipe esperantista. Ĉiuj tri tavoloj de tradiciaj priokupiĝoj aperas jam denove: memparodia kaj preskaŭ nekredibla E-movada sentimentalismo (mieliga enbuŝo); brandej-nivela seksprovokado, de la unusola ekzistanta senmorala speco ("Ĉar devas esti virto/por esti privenkita"); kaj simple *mondampleksa* petolemo. Mi estas konvinkita, ke niaj poetoj tiel emas pure kaj nure imite al siaj kolegoj; se nur oni povus *izoli* unu el ili, tiu ĉi memgenera hiperbola spiralo ĉesus. Kun la ĉiamaj esceptoj, la elito laŭŝajne nesufiĉe ellitiĝas... aŭ volas tion ŝajnigi.

Ken Miner (Novjorko)

Leteroj el Sud-Vjetnamio. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1964. 121 p. 19 X 13 cm. 21 diversaŭtoraj leteroj.

Resumo: Sub formo de leteroj el plej diversaj lokoj en suda Vjetnamio, verkitaj de soldatoj, vilaĝanoj, k.a., la libro prezentas aron da epizodoj, en kiuj torturoj, suferoj, bataloj kaj manifestacioj formas la ĉefajn temojn. La okazaĵoj rakontitaj ampleksas la periodon inter 1960 kaj 1963. Estas aldonitaj du ilustraĵoj.

Sen eliro kaj La respektema p..., dramoj de Jean-Paul SARTRE. El la franca trad. R. BERNARD. Eld. Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, 1964. 111 p., 20 X 13 cm. Prezo: 6,— gld. (24 st).*

Kristana-Evangelia Terminaro Esperanta-germana, de Erich QUENTIN. Eld. Germana sekcio de KELI, 1963. 40 p. 30 X 21 cm, multobligita.

Pollando. Eld. "Polonia", Varsovio, 1963. Grandformata kolorpresita faldfolio kun mapo. Senpage ricevebla ĉe polaj ambasadoj.

Objektiva vivkoncepto, de Ib SCHLEICHER. Eld. Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F, Danlando, 1963. 26 p. 21 X 15 cm, il. Senpaga traktaĵo.



Poul Thorsen

ricevitaj
eldonaĵoj

"Angoroj": farso kun tri kadavroj

Mi ne perfidas sekreton, se mi sciigas, ke la filmo de J. L. Mahé, prezentita unuafoje en Parizo la 16-an de majo, apartenas al la kriminala — eĉ al la "nigra" genro. Abundaj informoj, eĉ kliŝoj, jam aperis en la gazetaro. Mi ankaŭ ne volas diskuti la elekton de tia temo, kiu certe ŝajnos fremda al multaj.

Ĉio invitas nin konsideri serioze tiun eksperimenton: kaj la aŭspicio de U.E.A., kaj la partopreno de la Prezidanto de l'Akademio — kies komentoj akompanas tre talentajn bildojn de Parizo — kaj la nigra tragedio, kiu disvolviĝas antaŭ niaj okuloj. Tamen...

La intrigo, iom tro simpla por unuhora filmo, estas ja nur preteksto. Mahé volis pruvi, ke oni povas realigi filmon "kiel la aliaj" en Esperanto. Sed la du gangsteroj (Srdjan Flego kaj Marc Darnault), kiuj konversacias kiel Ĉe-instruistoj per tro fajlita kaj tro malrapida dialogo — kvankam emajlita per kelkaj "Putre!" kaj aliaj sakraĵoj — ne sukcesas timigi nin. Malgraŭ nekontestebla talento, ili estis videble katenitaj de artifika dialogo. La dua parto estas pli sukcesa. Jana Ravŝelj

majstre kaj konvinke ludas la streĉan angoron kaj finas per brilega histeria sceno. Tiu rolo ja pli prosperas al ŝi, ol tiu de vampirino-apaĉino, kiun Mahé trudis al ŝi en la unua parto. Cetere la tuto (escepte la "enkondukon", kies ligo kun la cetero ne estas sufiĉe pravigita) aspektas pli teatra ol kina. Ĉio estas en la ludo de la ĉefaj geaktoroj. Tamen Mahé, malgraŭ kelkaj eraretoj (interalie en la dekoracio de la gangstera ĉambro), majstre manipulas la kameron. Inter la amatoraj kontribuoj salutendas Raymond Schwartz, perfekta en epizoda rolo de polickomisaro. Kaj apartan laŭdon — ne: laŭdegon — ni devas direkti al René Texier pro la originala muziko.

Feliĉe, Mahé ne konsideras tro serioze tiun sangoplenan dramon. Kiam la roluloj ŝakras aŭtografojn de Kalocsay aŭ legas *Heroldon*, la aŭtoro fariĝas komplico de la spektanto por amuziĝi pri sia verko. Tiu okulumo al la spektanto estas bona ŝirmilo kontraŭ la kritikoj. Ĉar Mahé, pli ol Hiĉkoka teroristo, estas ŝvarcema farsulo. Kaj estas pli bone tiel.

Recenzis: Maryvonne Le Goffic

Kien ekskursi ?



Post kelkaj semajnoj komenciĝos la 49-a Universala Kongreso. Interesaj eroj de la riĉa programo estas, kiel kutime, tuttagaj ekskursoj tra la kongresa lando. Ĉijare la kongresanoj povas elekti inter kvar diversaj ekskursoj: al Delto-Laboroj — al Amsterdam — al la Fermdigo — al Walcheren.

Delto-Laboroj. Tiu ĉi ekskurso estas planita ĝuste por tiuj personoj, kiuj deziras pasigi plurajn horojn malproksime de la urbaj bruoj en trankvila kaj ripoziga sfero. Malgraŭ la nomo, la ekskurso tute ne havas teknikan karakteron. Dum la tuta tempo de la ekskurso oni povas komforte sidi en la belaj salonoj de la ŝipo, babilante kaj trinkante, kvazaŭ oni estus en luksa vojaĝanta restoracio. Estas unika okazo por veturi tra riveroj kaj kanaloj de Nederlando, preterpasi ĉarmajn vilaĝojn kaj urbetojn. Reveninte al Rotterdam (la ŝipo forveturas de kaj revenas al tiu ĉi urbo) agrabla surprizo atendas la ekskursantojn: la urbestro de Rotterdam ilin akceptos oficiale en la urbdomo.

Amsterdam. Kion diri pri tiu ĉi urbo? Ke ĝi estas unu el la plej belaj, unu el la plej "nederlandaj" urboj en Nederlando? Ke, pro siaj kanaloj, ĝi memorigas Venecion? Ke ĝi estas la urbo de la diamantoj? Vi partoprenu en tiu ekskurso kaj mem povos konstati kiom interesa, kiom bela estas Amsterdam.

Fermdigo. La vizito al la fama fermdigo estas preteksto por interesa ekskurso en norda parto de Nederlando. La aŭtobusoj vojaĝos, kie en la pasinta tempo la maro ondis. Ili

trairos fiŝkaptistajn vilaĝojn... sen maro. Ili trairos tiun parton de Nederlando, kiun la nederlandanoj mem kreis.

Walcheren. Por tiuj personoj, kiuj ŝatas la pitoreskan malnovon la ekskurso al Walcheren estas la plej taŭga. Walcheren estis inundita dum la lasta mondmilito kaj belegaj domoj el la 12-a, 14-a kaj 15-a jarcentoj estis detruitaj. Sed la vigla loĝantaro laboregis dum jaroj kaj fine ĉio estis rekonstruita — en la malnova formo kaj eĉ pli bele. Dum la vizito al Walcheren vi vidos i.a. la ĉarmajn virinojn en siaj zelandaj kostumoj. Sed ŝparu kelkajn fotojn de via filmo, ĉar atendas vin la urbeto Veere. Tie la tempo haltis en la mezepoko, por ke ankaŭ vi povu ĝui tiun interesan atmosferon.

GRAVEGA AVERTO

Absolute neniuj povos eniri la kongresejon sen kongreskarto, nek povos trovi tranoktejon sen antaŭa aranĝo. Kiu malobservas tiun ĉi averton grave malhelpas ne nur al si mem, sed ankaŭ al la Kongreso.

EŬROPA ESPERANTO-KONFERENCO 1965, VIENO

Le aranĝo okazos sub aŭspicio de UEA de la 11-a ĝis la 17-a de julio 1965. Devizo: "Esperanto en la praktikon". Dum la nunjara UK en Hago membroj de la organiza komitato informos vin pri tiu ĉi aranĝo, kiu estos unu el la plej gravaj en 1965 en Eŭropo, kaj samtempe akceptos aliĝojn. Vizitu la oficialan budon en la akceptejo de la UK en Hago!

LAŬFAKE

Literaturo

● La 15-a eldono de "Index Translationum" montras ke en 1962, pro la datreveno en 1961, aperis 129 tradukoj el Rabindranath Thakur (Tagore) — pli ol el Tolstoj, Shakespeare aŭ Dostoevski. Multe kreskis la tradukista interesiĝo pri Jean-Paul Sartre. (Unesko)

Ornitologio

● Aperis la unua eldono 17-paĝa de nova multobligita bulteno "La Mevo", organo de ORE (Ornitologia Rondo E-lingva). La enhavo prezentas seriozajn diskutojn pri birdonomoj, kaj interesajn raportojn. Abono kun membreco estas 4,— gld. (16 st). Pagojn akceptas delegitoj de ISAE.

Rotario

● S-ro N. Williams, 237 Two Trees Lane, Denton, Manchester, Britujo — nun vicprezidanto de la brita sekcio de la rotaria movado — listigas rotariajn klubojn, kie troviĝas esperantistoj, kaj petas rotarianojn kontakti lin.

LAŬLANDE

Brazilo

● Rezulte de la Brazila E-Kongreso en januaro, 3 kursoj komenciĝis dum majo en la Universitato de Ceará en Fortaleza.

Francujo

● En la Kultura Semajno en kastelo Grésillon komence de aprilo partoprenis 85 personoj, inter kiuj 33 gelernantoj el Esperanto-kursoj en pedagogiaj seminarioj.

● Estas starigata internacia federacio por la protekto kaj unueco de la franca lingvo, kun la celo i.a. protekti la lingvon kontraŭ malamikoj internaj (ŝanĝoj, degeneroj) kaj eksteraj (anglismoj...).

● Vicprezidanto de UFE Roger Blanc ĵus finis serion de 12 prelegoj al entute 2100 personoj pri "Bulgario", kun komentario franca kaj Esperanta.

Hispanujo

● En urbo Vilanova i Geltrú okazis la 26-an de aprilo renkontiĝo de ĉ. 500 esperantistoj el la tuta kataluna regiono, sub prezido de la Prezidanto de HEF. Oni pritraktis en forumo la vigligon de la lokaj grupoj.

Israelo

● Dank' al nova aktiviĝo de la Esperanto-Ligo Israela, precipe direktita al ministerioj, la israela registaro estos denove reprezentita en la Universala Kongreso en Hago. Krome, la urbestro de Tel Aviv sendis favoran cirkuleron pri Esperanto-instruado al ĉiuj urbaj gimnazioj.

Japanujo

● Post klopodoj de D-ro A. Halbedl en Knittelfeld, Aŭstrujo, kaj S-ro E. Ito en Kameoka, Japanujo, la du urboj oficiale ĝemeliĝis la 14 aprilo per kontrakto en lingvoj germana, japana kaj Esperanto. La japanan solenajon ĉeestis i.a. la aŭstra ambasadoro

al Japanujo kaj delegito de la japana Eksterlanda Ministrejo.

**mallongaj
novaĵoj**



Madagaskaro

● Preta estas manuskripto de afrika-malgaŝa antologio, en traduko de E. Raveloson.

Nov-Zelando

● En kunlaboro kun la ŝtata eduka fako la Novzelanda Instruista Esperanto-Asocio disvastigas la lingvon inter instruistoj de la pacifikaj insuloj per senpaga disponigo de kurso kun sonbendoj.

● Nova elementa-mezgrada lernejo en Wellington enkondukas Esperanton devige jam de sia inaŭguro. En 1965 620 infanoj lernos tie devige la lingvon: la plej granda grupo en la mondo.

Usono

● Revenante el komerca vojaĝo tra Sudameriko, Vicprezidanto de UEA S-ro E. L. M. Wensing haltis en Sanfrancisko, kie li prelegis al regiona Komitato por Unesko, kaj alparolis grupon da financaj redaktoroj de sanfranciskaj ĵurnaloj pri la Instituto por Esperanto en komerco kaj Industrio (EKI). Aperis favoraj artikoloj en pluraj ĵurnaloj, inter kiuj la tre grava "Examiner". La kontaktojn aranĝis S-ino Schulze.

Alveninte en Novjorko, S-ro Wensing trovis ampleksan programon preparitan de S-roj Starr kaj Stollman. Krom televida kaj radiaj intervjuoj, okazis grava renkontiĝo en la Komerca Fako de Novjorko, Madison Avenue. Inter aliaj eminentuloj, ĉeestis la estro de la Internacia Fako de la Usona Komerca Departemento, la direktoro de la oficejo de la Komerca Departemento de la ŝtato Novjorko, kaj la direktoro de la Novjorka Asocio por Komerco kaj Industrio, kiu lasta decidis varme rekomendi la agadon de EKI al la 4000 kompanioj-membroj de la Asocio. "Vi ne bezonas konvinki min, ke la angla ne estas mondlingvo", li emfazis.

*Ambasadoro
Hartlmayr
salutas la
solenantojn
en Kameoka,
Japanujo*



LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
Ivo Osibov, Splitskog odreda 15,
SPLIT, Jugoslavio.**

EL LA LANDAJ SEKCIOJ

Bulgarujo — La tradicion Balon-Festivalon de la Bulgara Esperantista Junularo partoprenis ĉijare pli ol 600 gejunuloj, precipe lernantoj. En la festivalo partoprenis per belartaj programoj la junularaj grupoj el Stara Zagora, Gabrovo, Varna, Tolbuhin, Dimitrovgrad, Haskovo kaj Ruse. Unuan premion oni aljuĝis al la junulara grupo el Gabrovo kaj la duan al la grupo el Stara Zagora. Unuan premion en la Oratora konkurso gajnis f-ino Delka Ĉolakova el Sofio. (JIS)

Germanujo — Dum la 42-a Germana Esperanto-Kongreso en Soltau (16-a ĝis 18-a de Majo 1964) elektiĝis nova Estraro de GEJ en jena konsisto: prezidanto Michael Zeilinger, 851 Fürth, Herrnstr. 58, vicprezidanto Ulrich Lins, 5 Köln-Dellbrück, Gemarkenstr. 146, sekretario Dieter Kleeman, 62 Wiesbaden, Fritz-Kalle-Str. 26. La ĉefaj taskoj de la prezidanto estas la informa agado kaj de la vicprezidanto la eksterlandaj rilatoj. La sidejo de GEJ troviĝas ĉe la prezidanto. (UL)

Svedujo — SEJU eldonis eksterordinaran informan numeron de sia gazeto en eldonnombro de 10.000 ekzempleroj. La gazeton oni distribuas en neesperantistaj junularaj medioj. Lige kun la eldono de speciala "Kvinpinto" la prezidanto de SEJU Lars Olsson gvidis

prelegkampanjon en meza Svedujo. SEJU ankaŭ ĵus eldonis glumarkon (3000 ekz.) kun svedlingva teksto: "Estas moderne paroli Esperanton". Estas rimarkinde ke tian informan agadon la sveda sekcio de TEJO povis entrepreni dank' al tre bonaj rilatoj kun Sveda Esperanto-Federacio, kiu sukcesis kolekti jam pli ol 1.100 US-dolarojn por agado inter la junularo. (JIS)

Usono — Je invito de la Studenta Esperanto-Klubo de la Universitato Harvard, en Cambridge okazis la unua Nordorienta Interkolegia Esperanto-Konferenco de JEN de la 17-a ĝis la 19-a de Aprilo. Ĝi ĉefe celis kunigi esperantistajn studentojn de la orienta marbordo de Usono por interkonatiĝo, interŝanĝo de spertoj pri Esperanto-agado kaj pli proksima kunlaboro en la estonteco. La Konferencon partoprenis 21 studentoj el 6 universitatoj, 6 mezlernejoj kaj 11 nelernejoj.

Dum la Konferenco laboris konversaciaj grupoj kunigitaj laŭ lingva kapablo. Studentaj gvidistoj gvidis la partoprenantojn tra la Universitato Harvard, la plej malnova en Usono (fondita en la jaro 1636). Okazis kunidoj de la Estraro de JEN, en kiuj oni interalie konstatis ke JEN nuntempe havas proksimume 100 membrojn kaj krome 50 abonantojn de la JEN-bulteno. Elektita estas nova sekretariino Ann Bodine, juna studentino pri antropologio el la Universitato de Cornell. Ĝenerala kunveno de la Konferenco dediĉiĝis al informagado inter studentoj, agado inter nestudentoj kaj kunlaboro kaj kolektiva agado en JEN. En la kvar diskutaj grupoj estas priparolitaj la temoj: JEN-bulteno, informado, agado en mezlernejoj kaj agado en universitatoj. D-ro Julius Balbin el New York prelegis pri la arto de Esperanta poezitradukado.

LA KONGRESA KOMITATO INFORMAS

Programo de la Kongreso

Sabato, la 8-a: alveno kaj akcepto de Kongresanoj en Broek-in-Waterland, malgranda vilaĝo norde de Amsterdam; por tiuj kiuj alveturos per trajno, funkcios akceptejo sur la unua kajo de la centra stacidomo de Amsterdam;

Dimanĉo, la 9-a: solena inaŭguro de la Kongreso je la 14-a horo en Anne Frank-Domo, 263, Prinsengracht, Amsterdam; salutoj de reprezentantoj de internaciaj junularaj organizaĵoj kaj de landaj sekcioj; akcepto, personaj interparoloj de gastoj, kongresanoj kaj Estraranoj; mallonga enkonduko kaj klarigoj pri la interesaĵoj kaj historio de la Anne Frank-Domo, grupaj vizitoj de la Domo; prezentado de Internacia Arta Teatro (kvar unu-aktaĵoj de Ionesco, Pirandello, Matkoviĉ kaj Ĉehov); kabareda programo de SEK el Zagreb;

Lundo, la 10-a: oficiala akcepto de la Kongresanoj en la Urbodomo de Amsterdam; ekskurso sur la kanaloj; prelego de parlamentano G. H. Slotemaker de Bruine:

"Milito, ĉu solvilo por internaciaj problemoj?"

Mardo, la 11-a: sportaj renkontiĝoj; programo de filmoj pri marlaboroj en Nederlando, diskutoj kaj kunvenoj, oficiala akcepto en la Komunumo de Broek-in-Waterland;

Merkredo, la 12-a: vizito al Amsterdam; muzika kaj kultura vespero en la sidejo de AMVJ (junulara societo) en Amsterdam; renkontiĝo kun la Amsterdama junularo;

Ĵaŭdo, la 13-a: diskutoj kaj kunvenoj; sportaj renkontiĝoj; enkonduko kaj diskuto pri la temo "Nuntempa stato de edukado en Afriko", kiun aranĝos Centro de Esploro pri Afriko de PEJ kaj "Aktivado de junaj volontuloj en Kameruno", kiun prezentos ing. W. H. Dijkstra, ĉefestrarano de la Nederlanda Kristana Unuiĝo de Kamparaj Gejunuloj;

Vendredo, la 14-a: ekskurso al la regiono de Gooi; oficiala akcepto kaj vizito al la Urbodomo de Hilversum; vizito de la ejoj de AVRO-radiostacio kaj de la kastelo de Muiden; adiaŭa vespero;

Sabato, la 15-a: fermo de la Kongreso; forveturo de la Kongresanoj.



ELEKTO DE KOMITATANOJ B

Jus okazis la voĉdonado pri komitatanoj B por la venonta laborperiodo (vidu jan. no. "Esperanto" 1964, p. 17). La limdato por sendi la voĉdonilojn estis la 31-a de majo 1964. Estis proponitaj 8 kandidatoj por 6 liberaj lokoj. La elektoj okazis laŭ la preskriboj en art. 28 de la Ĝenerala Regularo de UEA (vidu p. 157 de Jarlibro 1959, Unua Parto).

Voĉdonis entute 694 delegitoj. La tutmonda delegitaro elektis per la parenteze indikitaj nombroj da voĉoj la jenajn personojn, laŭ alfabeto sinsekvo: D-ro A. Albault (618), Prof. D-ro I. Lapenna (636), Prof. J. Régulo Pérez (582), K. Söderberg (558), C. Stöp-Bowitz (551), H. Tonkin (459). El ili nur S-ro Tonkin estas nova komitatano. Ĉiuj aliaj personoj estis komitatanoj B ankaŭ en la pasinta periodo.

La komisiono por kalkulado de la voĉoj konsistis el la jenaj personoj, ĉiuj dumvivaj membroj de U.E.A.: F-ino E. M. Maasbommel, F-ino J. H. v. d. Hengel, S-ro J. Th. de Goey kaj F-ino M. H. Vermaas, direktorino de la C.O. Per sia subskribo ili konfirmis la korektecon de la supremenciita rezulto de voĉdono.

M. H. Vermaas
Direktorino C.O.

UEA PROPRIETULO DE "LA PRAKTIKO"


el la centra
oficejo

Jam plurajn jarojn S-ro Andreo Cseh, kiu dum jardekoj modele redaktis la revuon La Praktiko, serĉis posteulon por transdoni la redaktoran taskon. Krome, ĉar Internacia Esperanto-Instituto estis ĝia eldonanto, ankaŭ la administrado fariĝis tro peza tasko por li. Fine, ekde 1964, ĉio estis transdonita al S-ino E. Burgler-Jezsó. Intertempe traktadoj okazis kun UEA, kies rezulto estas, ke, dum S-ino Burgler restas redaktorino, UEA fariĝis proprietulo kaj eldonanto de La Praktiko.

Certe oni komprenas, ke tiaj ŝanĝoj kaŭzis administrajn malglataĵojn. Tutcerte, en la komenco mankoj kaj eraretoj estos neeviteblaj. Espereble, la abonantoj bonvolos ilin pardoni.

La Praktiko restos, kiel antaŭe, agrabla kaj ne malfacila legaĵo por ĉiuj, kaj tre taŭga materialo por kursanoj. La enhavo respondos al la iama subtitolo, kiu revenos: "La gazeto kiu instruas kaj amuzas". Ofte oni plendas, ke mankas facila legaĵo. Jen ĝi: La Praktiko, nun regule aperanta ĉiumonate. La kotizo restis nur 8,— gld. (32 st). Ni varme alvokas al ĉiuj membroj, alboni kaj abonigi.

AL TOKIO EN 1965 PER TIU ĈI MAŜINO



La aviadila vojaĝo entreprenita de U.E.A. definitive realiĝos. Pro retiriĝo de kelkaj personoj, ni povas ankoraŭ akcepti partoprenantojn por la unua aviadilo. Oni anoncu sin tre baldaŭ! Kiel komunikite jam pli frue, la prezo de la veturo Amsterdam — Tokio — Amsterdam, inkluzive de ĉiuj servoj kaj prizorgoj dumvoje, estas 2250 gld. (9000 steloj). La maŝino estas tipo D.C. 7, de nederlanda kompanio, kun maksimuma komforto kaj maksimuma sekureco. La pezo de pakaĵoj allasita por ĉiu persono estas po 20 kg., inkluzive de manpakaĵoj. La kontrolo je tio estos severa. Ankaŭ kontraŭ krompago oni ne povos kunporti pli multe. La servado estas egala al tiu en la unua klaso je la regulaj linioj de la grandaj flugentreprenoj. La stevardinoj parolos Esperanton. Dum la tuta vojaĝo oni servados manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. En du-tri lokoj oni alteriĝos por preni benzinon, sed

estos malpermesite forlasi tie la flughavenon. La sidlokoj estas aranĝitaj en vicoj de po 3 kaj po 2 seĝoj. Ĉiu partoprenanto havos rezervitan lokon. Ni fiksis la lokojn laŭ sinsekvo de la alveno de la plena vojaĝsumo.

Ĉu realiĝos la veturo per dua aviadilo, tio tute dependas de la nombro de anoncantoj. La kondiĉoj estas egalaj al tiuj por la unua. Ĝis nun tro malmultaj anoncis sin, kaj nur sub rezervo. Ni ne volas riski perdon pro nepleniĝo de la aviadilo. Tial, aliĝintoj kaj aliĝontoj al la 50-a U.K., serioze konsideru la vojaĝon! Se sufiĉe granda grupo el unu sama lando partoprenos, ekzistas ebleco venigi ĝin al Amsterdam per aviadilo de la sama entrepreno, je tre reduktita prezo. Zorgu ke vi ne maltrafos la unikan eblecon vidi Japanujon!

M. H. Vermaas
Direktorino C.O.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa
Sekretario

esperanto
julio-aŭg.
1964 137

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo. En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Por aliaj horsistemoj vidu "Esperanto" 1963, p. 117 (junio). Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 200m. (1502 kcs), 48.90m. (6135 kcs), 42.11m. (7125 kcs), 41.99m. (7145 kcs), 41.27m. (7270 kcs), 41.18m. (7285 kcs), 31.50m. (9525 kcs), 31.45m. (9540 kcs). P. Pola Radio, Esperantaj disaŭdigoj, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	19.00-19.25	Sofia, 48.62m. (6170 kcs), 39.11m. (7670 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	23.30-23.55	Sofia, 48.62m. (6170 kcs), 41.35m. (7255 kcs). P.
Lundo	6.15- 6.30	Gdansk, 230m. (1304 kcs), I. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdansk, Pollando.
	12.10-12.20	Bern, 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 19.67m. (15255 kcs), 19.60m. (15305 kcs), 13.94m. (21520 kcs) (D-ro A. Baur). Svisa Radio, S.O.C., Giacomettistr. 1, Bern, Svislando.
	22.40-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746kcs). P., N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	15.00-15.15	Valladolid, 203m. (1475 kcs), K.I. Radio Valladolid, Hispanujo.
	16.50-17.00	Wien, 577m. (520 kcs). 514m. (584 kcs). 293m. (1025 kcs). 25.45m. (11785). P. Radio Wien Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma, 50.34m. (5960 kcs), 41.24m. (7270 kcs), 31.33m. (9570 kcs). P. Radio Roma, Esperanto Fako, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	12.10-12.20	Bern. Kiel lunde, (S-ro C. Gacond).
	17.45-18.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m. (5990 kcs), 30.71m. (9770 kcs), 25.10m. (11.950 kcs), 16.78m. (17.880 kcs). K. I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	18.45-19.00	Resende, 1961m. (153 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.
Ĵaŭdo	17.50-18.00	Praha, 233m. (1286 kcs). I. Radio Praha, Disaŭdigoj por Aŭstrujo, Praha, Ĉeĥoslovakujo (nur la lastan ĵaŭdon de la monato).
	20.30-20.45	Volta Redonda, 1560m. (192 kcs). P. Radio Siderurgica Nacional ZYP 26, Volta Redonda (Rio de Janeiro), Brazilo.
	21.15-21.25	Bern 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 25.61m. (11715 kcs), 19.60m. (15305 kcs). P. (D-ro A. Baur).
	23.05-23.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.05-23.20	Beograd, 439m. (683 kcs), 48.78m. (6150 kcs). P. (programo de Radio Zagreb).
	23.00-23.10	Valencia, 193m. (1554 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Vendredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.45-22.55	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs), P., V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
Sabato	9.45-10.00	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto Av. Almirante Barosso 81, Rio de Janeiro, Brazilo.
	16.00-16.30	Guatemala, 220m. (1360 kcs), 48.54m. (6180 kcs), 30.75m. (9760 kcs). I.K. Radio Nacional TGW, Guatemala Cd., Mezameriko.
	19.00-19.15	Teresina, 259m. (1160 kcs), 62.56m. (4795 kcs). P. Radio Pioneira de Teresina, Rua Teodoro Pacheco 1179, Teresina, (Piauí). Brazilo.
	21.15-21.25	Bern. Kiel ĵaŭde. (S-ro C. Gacond).

RADIO ROMA. 3-VII, Fontanoj de Romo; 7-VII, Tra la literaturo; 10-VII, Papo Johano XXIII; 14-VII, Novaĵoj el Italujo; 17-VII, Literaturaj kafejoj en Italujo; 21-VII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 24-VII, La granda itala tipografo G. B. Bodoni; 28-VII, Leterkesto; 31-VII, La urbo de la itala Esperanto-kongreso: Sorrento; 4-VIII, Tra la literaturo; 7-VIII, Du gesanktuloj de la karitato; 11-VIII, Novaĵoj el Italujo; 14-VIII, La nova tunelo sub la Granda Sankta Bernardo; 18-VIII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 21-VIII, Latinaj lirikistoj: Catullus; 25-VIII, Leterkesto; 28-VIII, Preĝejoj de Romo. Krome, ĉiun merkredon:

Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: S-ro Luigi Minnaja (marde kaj merkrede) kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella (vendrede).

nekrologo

PETRUS HEILKER (1883-1964)

Okdek-unujara forpasis en Schiedam, Nederlando, P. Heilker, siatempa membro de la Lingva Komitato, prezidinto de diversaj katolikaj kongresoj kaj de la organizaĵo "Nederlanda Katoliko".

S-ro Heilker, kiu mortis la 18-an de majo, verkis plurajn lernolibrojn kaj prezentis kurson en la nederlanda radio.

CITAĴO

La Eŭropa Traduka Centro (Delft): "La evoluo de scienco kaj esplorado, precipe en landoj, kiuj antaŭe ne partoprenis ĝin, per si mem sendube malfaciligos la lingvan situacion. Nun, kiam Ĉinujo ekhavas influon kiel produktanto de sciencaj informoj, estas gravege, ke ĉiuj interesitaj pri la progreso de la scienco interligu la manojn kaj helpu unu al alia por venki la komunajn barojn."

DELEGITOJ

Brazilo

Recife FD (Bankaj aferoj):

S-ro B. L. Ferreira, bankoficisto,
Rua Sítio da Máquina, 94 — Casa Amarela,
Tel.: 44222

FD (Geologio): Prof. D-ro J. M. Mabesoone,
universitata profesoro, Escola de Geologia,
Caixa Postal 2492.

FD (Komerco): S-ro J. I. Andrade, komer-
cisto, Rua da Glória 478.

FD (Religio: Spiritismo): La FD (Bankaj
aferoj).

Rio de Janeiro FD (Pentrado):

S-ro W. Simão, industrio-ficisto, Pça Repú-
blica 54-2, Tel. 42-4357.

São José dos Campos VD: S-ro M. Rodrigues,
ĉarpentisto, Rua Siqueira Campos, 536, Tel:
35-97.

Britujo

Addlestone (Surrey) 11.000

JD: S-ro M. R. Wastell, studento, Barclays
Bank House, 157 Station Road.

Havering (Essex) 250.000

D: S-ro Ch. Veness, instruisto, 1 Stanley
Avenue, Gidea Park, Romford.

VD: S-ro W. M. Goodes, instruisto, 7,
Osborne Close, Hornchurch; Tel. Horn-
church 48860.

FD (Inĝenieraj aferoj): S-ro R. C. W. Bed-
ford, civila inĝeniero, 5 Osborne Close.
Tel. Hornchurch 48726.

FD (Instruado): la VD.

FD (Religiaj aferoj): S-ro S. Hardy, 10
Meadway, Seven Kings, Ilford,
Tel: Goodmayes 4483.

Hornchurch D: vakas.

FD (Instruado): vakas.

Romford D: vakas.

Bulgarujo

Sofia JD: S-ro P. Todorov, studento, str.
"Sredna gora" 88.

FD (matematiko): S-ro Tonko Tonkov,
universitata asistanto, str. Ĉehov 58,
Sofia 13.

Zahari Stojanovo (Popovo) 1.100.

FD (Abelbredado): S-ro S. D. Minĉev,
terkulturisto.

Ĉeĥoslovakio

Ústí nad Labem FD (Kulturaferoj):

S-ro M. Hruška, direktoro de kulturdomo,
Fučíkova 542/358; Tel. Ústí n.L. 2169.

Danlando

Karise (Sjælland) 800.

FD (Ornitologio): S-ro Olav Christensen,
ĉefinstruisto, Alslev-Taagerup.
Tel.: Vemmetofte III Tempo 18—19.

Finnlando

Espoo (Uudenmaan lääni) 63.000.

D: S-ro Arvi Jurva, elektroteknikisto, Finno
Kaitans. Tel: 886805.

Helsinki VD: S-ro R. José Milton, tradukisto,
Kulosaaren Puistotie 38-1. Tel.: 687 121.

Kokemäki FD:

(Filatelo): S-ro Asko Salminen, instruisto,
Kokemäki Tulkila; Tel: 60254.

Seinäjäki VD: S-ro Timo Kemppi, elektristo,
Ammattikoulunkatu 2. D. 52. Tel. 21966/57.
FD (Astronomio): la VD.

Francujo

Châteaumeillant (Cher) 2865

JD: S-ro Jean-Pierre Boulet, studento,
Grande Rue.

Domfront FD (Historio):

S-ro Gaston Veron, notaria aktisto, place de
la Petite Bruyère.

FD (Juro): la FD (Historio).

Essey-lès-Nancy FD (P.T.T.):

S-ro Pierre Fondrillon, poŝtoficisto, 28, rue
Roger-Bérin.

Gevrey-Chambertin (Côte d'Or) 2.600. D:

S-ro Maurice Lespagnol, emerita profesoro,
104 route de Beaune.

Laxou (Meurthe-et-Moselle) 15.000.

D: S-ro Jean-Paul Colnot, helpapotekisto, 15
Rue de Lavaux. Tel: 53-67-19 Nancy.

JD: La D.

Nancy JD: vakas.

FD (Presarto): vakas.

Nevers D: vakas.

Nice VD: S-ro R. T. Luquet, 23 rue de Dijon.

Paris VD: S-ro Erienne Gaudry, librotenisto,
127 avenue du Général Leclerc, Paris XIV.

Roderen près Thann (Haut Rhin) 650.

D: S-ro Roland Kubler, oficisto, 20 rue du
ruisseau.

JD: la D.

Romans FD (Folkloro): S-ro Henri Guiller-
mond, ŝulaboristo, 54 rue de Delay.

Tel. 9.92 en Romans.

Taninges (Haute-Savoie) 2.000.

FD (Turismo): S-ro François Trépier, tran-
ĉisto.

Germanujo

Bielefeld FD (Virinaj aferoj):

S-ro Klara Schmiedeberg, Dittfurtstr. 37 a.
Tel. 68933.

Brilon (Westfalen) 12.000.

D: F-ro M. Engelmann, teknika oficistino,
Sachsenweg 6. Tel. 555.

Hamm (Westfalen) 72.000.

D: S-ro Alfred Schnetzer, staciestro, Molt-
kestr. 15. Tel: 22941/390.

FD (Fervojo): la D.

Hispanujo

Sabadell FD (Kataluna literaturo):

S-ro V. Mateu-Nouvillas, oficisto, Plaza
Junqueras s/n 9° — 4 a.

Israelo

Tel-Aviv D: S-ro Dora Wunderbaum, librote-
nisto, Brennerstr. 22 .

Italujo

Albano (Roma) 20.000

D: S-ro G. Lacertosa, profesoro, Villa Fer-
raioni; tel. 930609.

Ravenna D: vakas.

Rimini (Forlì) 98.675.

D: S-ro P. Albino Ciccanti, pastro, Conv.
S. Bernardino; tel. 25 931.

Torino FD (Hidraŭliko) D-ro Mario Muretti,
inĝeniero, Via Torricelli 66. Tel. 59-46-29.

oficiala
informilo
n-ro 370
1 junio 1964

ĵus
aperis
Plena
Gramma-
tiko,
dua
volumo
—
mendu
tuj
ĉe
UEA:
11,10
gld.

esperanto
julio-aŭg.
1964 139

Japanujo

Nagoya FD (Elektra tekniko kaj patento):
S-ro T. Yui, patent-prokuristo, Ŝoŭa-ku,
Kobi-ĉo III-12, Kodan apato 220. Tel.
Tel. 84-4122.

Jugoslavio

Ĉaĉak (Srbija) 30.000.
JD: S-ro: Miloš Pantelić studento, vel.
Kolonija Slobode, Blok 8/VIII.
Varaždín FD (Bankaj aferoj):
S-ro Antun Zima, bankoficisto, Markoviĉeva
ul. 10; tel. 2316 (oficejo).

Kongio

Pointe Noire 56.000
D: S-ro Henri Rousseau, teknikisto de
publikaj laboroj, Aerodrome.

Nov-Zelando

Auckland VD: S-ro Wm. H. King, 23 Burch
Street, Mt. Albert; Tel. 83-253.
FD (Religio Oomoto) la D.

Pollando

Kłodzko (Dolny Śląsk) 26.000.
D: S-ro Witold Bugalski, ekonomiisto, ul.
Kwiatowa 1.
Pszczyna (Katowice).
D: S-ro Bolesław Jakubiec, ekonomiisto, ul.
Sienkiewicza 6/8; tel. 31-63 (oficejo).
Zakopane (Kraków) 27.000.
D: S-ro Bronisław Kłosowski, ul. Kościelska
42; tel. 25-91.

Usono

Oakland (California) 367.548.
D: S-ro William Harmon, fervoja adminis-
tranto, 5836 Buena Vista Avenue.
Tel. OL 3-2957.
FD (Turismo): la D.

ADRESKOREKTOJ

Francujo

Fécamp. D: S-ro E. Permanne, rue St.
Etienne 9.
Fontainebleau. D: S-ro G. Knopf, 19 rue de
l'Arbre Sec; tel. 931-43-62.

Nederlando

De Bilt. FD (Muziko): S-ro H. Valkenier,
Parkflat de Akker 179; tel. (030) 61573.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Azorin P., S-ro F., Santiago, Ĉilio.
Dharmatilake, D-ro C. H., Colombo, Cejlono.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1964

329. Zielinski, S-ro Zb., Aŭstrujo;
330. Costa, F-ino Yolanda de Araŭjo;
331. Knoedt, S-ro L. H., Brazilo;
332. Sorrel, S-ro James V., Taiwan, Ĉinujo;
333. Bedoya, S-ro C. A., Kolombio;
334. Rousseau, S-ro H., Kongio;
335. Bugge-Paulsen, Kapt. R., Norvegujo;
336. Edenby, S-ro Sven,
337. Lundin, Ing. Henry, Svedujo;
338. Langemeier, S-ro S., Svislando;
339. Correa, S-ro Alfonso;
340. Irvine, S-ro R. J.;
341. Kennelty, S-ino Margaret, Usono.

DONACOJ GENERALA KASO

Hedberg, S-ino Olga, Svedujo: 20,83 gld.
Wootton, S-ro P. H., Nov-Zelando: 2,50 gld.
Kamper, S-ro Christian, Usono: 14,40 gld.

FONDAJO LERNEJOJ (HELPO AL INFANOJ)

Heek, S-ro G. van, Nederlando: 120,— gld.

FONDAJO CANUTO

Moisley, S-ino M. C., B.C., Kanado: 1 MA.
Anonima: 1 J-MJ.
Wulfers-Meddens, S-ino G. H. M: 1 J-MJ.
Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro
ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

GRAVA ATENTIGO

Pluraj oficistoj de la Centra Oficejo forestos
dum la fino de julio kaj unua duono de aŭgusto
pro la Kongreso en Hago kaj pro libertempoj.
Pro tio bv. prefere ne skribi al la Centra
Oficejo dum la menciita periodo. Dankon !

ADRESSANGOJ

S-ro R. H. M. Markarian, membro de la
Internacia Konsulta Komisiono por Lernejoj,
transloĝigis al: The Grammar School, South-
port Road, Chorley, Lancs., Anglujo.

Ges-roj Eichholz (Magnetofona Servo de
UEA) ekde 1.9.64 loĝas ĉe: Esperanto Press,
CARDIFF, Ontario, Kanado.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1964

stato je la 31-a de majo
Konkurso I

	Lando	kvoto	poentoj	%
1.	Britujo	6691	5654	84,50
2.	Nederlando	5975	5005	83,77
3.	Italujo	4210	3490	82,90
4.	Hispanujo	2660	2190	82,33
5.	Francujo	7752	6196	79,93
6.	Brazilo	3694	2772	75,04
7.	Svedujo	7180	5095	70,96
8.	Usono	4526	3190	70,48
9.	Finnlando	3160	2180	68,99
10.	Svislando	2459	1600	65,07
11.	Belgujo	2055	1215	59,12
12.	Danlando	3099	1820	58,73
13.	Germanujo	7141	4075	57,06
14.	Japanujo	3690	2015	54,61
15.	Norvegujo	1755	930	52,99
16.	Jugoslavio	5375	1565	29,12

Konkurso II

1.	Argentino	810	660	81,48
2.	Aŭstralio	1475	1198	81,22
3.	Islando	250	195	78,—
4.	Portugalujo	485	370	76,29
5.	Aŭstrujo	1430	1065	74,48
6.	Kanado	842	520	61,76
7.	Madagaskaro	250	135	54,—
8.	Sudafriko	250	135	54,—
9.	Nov-Zelando	1481	785	53,—
10.	Israelo	460	215	46,74
11.	Urugvajo	250	75	30,—

Vidu la regulojn sur paĝo 38.

ANONCETOJ

Felix Hendrik Kat kaj **Elisabeth Westra** sciigas, ke ili geedziĝos lundon, la 10-an de aŭgusto 1964-a, posttagmeze je 3.30 horo en la urbdomo de Leeuwarden (Frislando), Nederlando. Akcepto: en la tago de la geedziĝo, posttagmeze de la 5-a ĝis la 6.30-a horo en restoracio "Prinsetún", Leeuwarden. Estonta adreso: Hackettweg 33, Heelsum, Nederlando.

Informojn pri la katolika religio oni povas senpage ricevi de la Internacia Katolika Informejo, Sekretariejo: Gasthuisring 54, Tilburg, Nederlando.

Kaptu la nunan unikan okazon, se vi deziras oferi ion por nia afero. Ĉiuj geesperantistoj kaj gesimpatiantoj, kie ajn ili loĝas en la mondo kaj ne povas ĉeesti la Kongreson, tamen havas nun ankoraŭ unikan okazon iom povi oferi, se ili volas, prefere valorajn uzitajn poŝtmarkojn por S-ro Zacho en Kopenhago, transdonante ilin al partoprenontoj de la Kongreso en Hago. Vidu "Esp." junio, p. 117.

Nenatura laco. Tiu sufero povas estiĝi ĉe la moderna evoluinta homo pro konflikto inter la humana kaj la malhumana partoj en la menso. Fotopresita prelego. (Prezo 2 int. respk.). Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Kiu italo, franco dezirus viziti Ĉeĥoslovakion, ekkoni rimarkindaĵojn laŭ propra elekto, interŝanĝe por garantii samon vialande? Detalaĵojn koresponde: Jaroslav Kuzník, Opava, Strossmayerova 9, ĈSSR.

Poŝtkartoj. Samideano deziras ricevi poŝtkartojn de fremdaj, malproksimaj gesamideanoj en la mondo por pruvi la utilecon de Esperanto kaj pravigi la uzadon de tiu ĉi bela internacia lingvo al gestudentoj. Mi respondos al ĉiuj kiuj demandas. S-ro Vincent Beaupré, 738 Ave Clairmont, Quebec 10, P.Q., Kanado.

Fraŭlino Bonnefous Yvonne, 12, Rue Vieille Mosquée 12, Orano (Alĝerio), deziras interŝanĝi poŝtkartojn, k.t.p. kun ĉiulandaj kaj ĉiutagaj gekorespondantoj.

Emerita instruistino, junaspekta, senfamilia, memstara lingvistino, volonte korp. kun 55-65-j. kolego, prefere lingvisto. Krom tio mi serĉas japanan aŭ ĉinian samideaninon por interŝanĝi gastigadon somere 1965. Persona renkontiĝo eble en den Haag (Kongresa n-ro 201). Jadwiga Gaweron, Skowronków 12, Katowice, Pollando.

Deziras korespondi jenaj gelernintoj: Rafael Sureda, studento 23-jara pri Juro; Rubén Ramírez, oficisto 58-jara; Ingrid Durán, odontologia studentino 20-jara; Leslie Franceschi, kemia studento 18-jara; María A. Arreaza, jura studentino. Komuna provizora adreso: Apartado Altamira 12.930, Caracas, Venezuelo.

Prelegu al ne-esperantistoj per diapozitivoj, kiel jam faras 100 kluboj en la mondo. Petu informojn de Lentaigne, 3, av. de la Gaillarde, Montpellier, Francujo. Opinio de S/B (Norvegujo) ... "Guste tian vivan prelegon mi sopiris".

KONDOLENCOJ OKAZE DE LA FORPASO DE PROF. YAGI

Okaze de la forpaso de Prof. Hideo Yagi, estinta Prezidanto de UEA, la Estraro ricevis multajn kondolencojn de diversaj Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj. La Estraro esprimas al ĉiuj tutkoran dankon pro tiuj esprimoj de kunsento, pri kiuj ĝi informos s-inon Yagi kaj la familion.

APERONTA ANTAŬ LA KONGRESO

ĉarmega poŝformata libro

"NEDERLANDO"

de

Jaap Romijn

kaj

Kees Scherer

Per ĝi vi konatiĝas kun la

KONGRESLANDO PER KOLORBILDOJ

Ĉu vi konas la poŝlibron "Infanoj ne konas limojn"? La sama eldonejo Bruna iniciatis nun la eldonon de samtipa libro "Nederlando", sed kun kolorbildoj

OKAZE DE LA KONGRESO

Prezo nur 3,50 gld., 14 steloj

Aĉetebla en la kongresaj standoj de U.E.A.
kaj de la Libroservo.

Valora memorajo por vi mem.

Solve de la problemo kiun donaceton porti al tiuj kiuj restis hejme.

DISTRA KOKTELO

por vojaĝantoj kaj aliaj

humura libro kun multaj ilustraĵoj

128 paĝoj

10 steloj

Mendu ĉe UEA aŭ ĉe la organiza komitato
de la "Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965"

Wien XV, Fünfhausgasse 16, Aŭstrujo




Hispanujo

La stadiono Chamartin en Hispanujo, hejmoloko de unu el la plej famaj futbalteamoj de la mondo – Futbalklubo Real Madrid – povas enteni pli ol centmil spektantojn. Specialajn problemojn starigis la ellaboro kaj instalo de la publikparola sistemo por tiu ĉi kvaretaĝa pelveg. Ĉi tie, same kiel por multaj aliaj stadionoj, oni petis al Philips projekti, evoluigi kaj liveri la bezonatan aparataron.


Tage kaj nokte oni uzas sennombrajn, plej diversajn produktojn de Philips en la tuta mondo. Inter ili estas: lumigaj ekipaĵoj, radioaparatoj kaj televidiloj, gramofondiskoj, aparatoj por la mastrumado, elektraj raziloj, elektrontuboj, kaj duonkondukiloj, industriaj kaj sciencaj instrumentoj, telekomunika ekipaĵo, radaro, publikparolaj sistemoj, medicinaj X-radiaj instalaĵoj, kemiaj kaj farmaciaj specialproduktoj.

Fido al **PHILIPS** estas tutmonda



Por etendi la longdistancon telefonan reton por la tuta Danlando, Philips instalas sian telefon-sistemon kiu ebligas 48 samtempajn konversaciojn. Multe pli ol duonmiliono da cirkvitkilometroj estas nun utiligata.

Danlando



La ĉefa kontrolĉambro de la televida stacio, kanalo 9, de T.C.N. en Sydney estas ekipita per transmiilo, anteno, studio- kaj kontrol-aparataro de Philips.

Aŭstralio

